



Wu Bangguo

Alta protektanto de la 89-a UK, prezidento de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko.



Xu Jialu

Honora prezidento de la Honora Komitato de la 89-a UK, vicprezidento de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko.



Zhao Qizheng

Prezidento de la Honora Komitato de la 89-a UK, ministro de la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko.

Ni Atendas Vian Kun-laboron

Karaj kongresanoj,

Kiam ni kun-festos, ni esperas ke nia festo restos por-ĉiam sur papero. Tion ni redaktantoj faros. Sed ni redaktantoj solaj ne povas fari tion bone. Ni atendas vian kun-laboron.

Sendu viajn **artikolojn**. Niaj retroŝt-adresoj estas: kuriero89uk@yahoo.com kaj wenjingen@yahoo.com. Viajn artikolojn bonvolu sendi al ĉambro **Halo 16A**. Ni volas fari nian ĵurnaleton bela. Do viaj **bildoj** estas bonvenaj.

Sendu viajn laŭdojn kaj mallaŭdojn al ni.

Se vi ŝatus **kontrol-legi** pres-provaĵojn, bonvolu veni al la redaktejo post la 18:00 vespere. Majstraĵoj fariĝas majstraĵoj post kiam ili estas *kontrolitaj*. Kontrol-legado estas la plej grava parto de la redaktado! Ni alte taksos vian laboron en kontrolado!

Antaŭ-dank-egon!

Wen Jingen, redaktanto

Karaj prezidantoj de forumoj, kunsidoj, prelegoj kaj aliaj programeroj:

Ne nur raportu viajn programerojn post ilia okazo, sed bonvolu prezenti ilin antaŭ ol ili okazos. Se kongresanoj legos iom pri viaj programeroj antaŭ -tempe, ili pli bone komprenos kaj partoprenos ilin. Do bonvolu sendi al ni ion pri viaj programeroj en facila lingvo. Redaktantoj

•ina popola diro: unu heroo bezonas tri helpantojn.

Komprenu kaj Komprenigu!

Saluton, karaj amikoj, komencantoj kaj bonaj parolantoj!

Bonvenon! Ni kune pasigos en la Esperanto-lando (i-jare en inio) feliĉan semajnon aŭ dektagon aŭ, por iuj, eĉ pli longan tempon per nia kara komuna lingvo Esperanto.

Eble vi jam trovis, ke nia papero havas la nomon "ĉiutaga ĵurnaleto" apud la kutima "kuriero". Kial? Antaŭ tagoj kiam ni diskutis kiel eldoni la "kuriero", iu esperantisto, tute ne komencanto, demandis, "Kio estas kuirero?" Ni trovis ankaŭ, ke la vorto "kuriero" ne troviĝas en la Baza Radikaro Oficiala. Kredeble, iuj komencantoj povas ne koni tiun vorton kaj aliajn ne-oftajn vortojn. Do ni decidis uzi facilan lingvon en nia informilo por ĉi-foja UK.

Eble iuj el vi bonege parolas nian lingvon kaj timas, ke komencantoj ne komprenos vin. Samtempe, iuj komencantoj eble timas, ke ili ne komprenis tre bonajn parolantojn. Tia timo estas kompren-ebla, ĉar por esperantistoj el orientaj landoj (ekzemple, ĉinoj, japanoj, koreoj, ktp), Esperanto ne estas tiel facile lernebla kiel por okcidentanoj. Krome, en ĉi tiu lando troviĝas komencantoj. Se vi trovas iujn mal-flue aŭ b-b-b-bal-b-but-te paroli Esperanton, ne pri-ridu ilin. Sciuj, ke ili ne bone sci-povas Esperanton eble pro tio, ke ili tre bonege laboras en aliaj kampoj. Ili estas bonaj kamparanoj, laboristoj, kuracistoj, sciencistoj, ktp. Nature ili ne povas studi Esperanton kiel lingvistoj, verkistoj aŭ tradukistoj.

Tamen, interkompreno estas ebla, se ni memoras celon de nia lingvo. En iuj lingvoj estas diversaj parol-manieroj, iuj pli facilaj ol aliaj. Dank' al grand-animeco de Zamenhof, nia lingvo estas ne malpli esprim-ri a ol naciaj lingvoj. Tial oni povas el-fari pli facilajn esprimojn por komencantoj. Ekzemple, komencanto eble ne scias la vorton "i erono" sed li certe scias kio estas "voja o-gvidanto". Se via a skultanto ne konas la vorton "inaguro", aŭ "malfermo" estas uzebla? Unu-vorte, mi kredas, ke vi saĵaj progresintoj kaj saĵaj komencantoj trovos vian rimedon kompreni kaj komprenigi. En tia interparolado komencantoj lernos pli belajn esprimojn de bone-parolantoj kaj bone-parolantoj lernos kiel komprenigi komencantojn. Ĉiuj gajnos multon.

Ni deziras al vi plezuritan interparoladon ĉi la venka fino de nia UK! Sukcesojn al vi iuj, komencantoj kaj bonaj parolantoj!

Wen Jingen

Gravaj anoncoj !!!

BANKEDO La bankeda giĉeto funkcios nur ĝis la **15h00 de dimanĉo**! Do, NE ĝis lundo, kiel anoncita en la Kongresa Libro. Se vi volas partopreni la bankedon kaj ankoraŭ ne aĉetis la bileton, bv. rapidu, ĉar restas nur limigita nombro de liberaj lokoj.

INTERNACIAJ EKZAMENOJ La antaŭtesto de la ekzamenoj okazos **lunde, je la 16h30 en salono Chu Tunan**. Vi povas aliĝi al la ekzamenoj ĉe la budo "ILEI" dimanĉe inter 13h00 – 17h00, kaj se restas libera loko ankaŭ je unu horo antaŭ la antaŭtesto ĉe la ekzamenosalono. Estas nur 24 lokoj. Bonvolu ne atendi ĝis la lasta minuto! (Ekzamena Komisiono)

MAGIA SPEKTAKLO – DIMANĈO, 15h30-16h30, ĴELEZO Don Espero prezentas **dimanĉe** magian spektaklon. Magio kaj amuzo distros la kongresanojn dum ĉirkaŭ unu horo dimanĉe en salono Ĵelezo. Unika ŝanco dum tiu ĉi UK vidi profesiajn magiaĵojn kaj aŭdi Esperanton. Don Espero (Bernd Schonberner) estas konata esperanta magiisto kiu jam prezentis siajn kapablojn en diversaj E-renkontiĝoj en diversaj landoj. Ne maltrafu ĝin!

NITOBESIMPOZIO Inaŭguro en salono Hujucz. Bv. atenti, ke la inaŭguro de Nitobe-simpozio okazos en **salono Hujucz je la 14h00**, kie s-ro Humphrey Tonkin inaŭgurparolas al la partoprenantoj de la simpozio kaj al la partoprenantoj de la Kongresa Temo. Post la inaŭgurparolado la simpozio translokiĝas al salono Chu Tunan.

Kio okazos

Hodiaŭ 24a de julio

Oni vidos ekspozicion pri Ĉinio 14:00 – 14:30, teretaĝo antaŭ la kongresejo, malfermo de ekspozicio pri Ĉinio

Oni vidos novajn librojn kaj ties verk-intojn 14:00-18:00 salono *Lusin*, libro-servo

Unua-fojaj kongres-anoj kun-sidos 19:00-20:00 salono *Ĵelezo*

Oni kon-at-iĝos kun novaj amikoj 20:00-22:00 salono *Hodler*, interkona vespero

Morgaŭ 25a de julio

Nia kongreso malfermiĝos (solena inaŭguro), salono *Zamenhof*, 10:00-12:00

Oni aŭdos akademian prezentadon (Inter-nacia Kongresa Universitato, mallonge, IKU): s-ro Li Shijun (Laŭlum), fama ĉina verkisto, iama akademiano, parolos pri evoluo de Esperanto, 13:00-14:00, salono *Wensing*; post tio s-ro Puramo Chong parolos pri Korea tradicia kuracado 14:15-15:15, en la sama salono.

Oni diskutos Kongresan Temon (lingva egaleco in internaciaj rilatoj) 14:00-16:30, salono *Hujucz*

Oni lernos ĉinan lingvon en kurseto, unua leciono el tri (**Ĉina Eksprese**), 15:30-16:15, salono *Wensing*

Oni diskutos pri problemoj de lingvoj en inter-naciaj rilatoj (Nitobe-simpozio) 14:00 – 17:45 salono *Hujucz*

Oomoto, japana religio, havos sian unuan kun-sidon, salono *Ĵelezo* 13:00-15:00

Urb-estro de Pekino invitos iujn el niaj kongresanoj, 18:00-19:30 *Hotelo Continental Grand*

Oni kantos (Intenacia koruso) 14:30-16:30 salono *Lappenna*

Ne-fumantoj kun-sidos 13:00-13:45, salono *Lappenna*. Vi certe scias, ke fumado estas malbona por via sano. Se vi estas ne-fumanto, ni gratulas vin. Se vi fumas, ni esperas, ke vi ne-fum-ant-i os.

Ĉu vi scias kiu estas Lusin?



Ni havas Salono Lusin en nia kongresejo. Lusin (Lu Xun 1881-1936) estas la plej granda ĉina verkisto kaj pensulo en la 20a jarcento. Multaj de liaj verkoj estas jam esperantigitaj. Li subtenas Esperanton.

Por komencantoj:

Karaj komencantoj:

Vi havas vian Kongresan Libron. Ĝi multe helpos vin. Uzu ĝin bone. Se vi ĉiu-tage legos pri kio okazos morgaŭ (kompren-eble vi povos uzi vortaron kiam vi vidos novajn vortojn), vi pli bone komprenos aliajn dum kunsidoj kaj prelegoj. Tiel la UK fariĝos bonega klaso ambro por vi. Provu!


Kio okazos en nia UK

- * Oni elektos novan estraron de UEA.
- * Vi povos amikiĝi kun esperantistoj el 49 landoj
- * Vi povos vidi prezentadon de ĉinaj kantoj kaj dancoj.
- * Vi povos aŭdi prelegojn pri evoluo de Esperanto, ĉinaj virinoj, ĉinaj skriboj, paca evoluo de ĉinio, ĉina pentra arto, problemo de manĝaĵo sur la tero, budha pagodo, tradicia korea kuracado de malsanoj ...
- * Religiuloj havos siajn kun-sidojn. Temos pri diversaj religioj: Budaismo, Bahaismo, Oomoto, Islamismo, Kristanismo, Katolikismo kaj aliaj.
- * Ĉina tat-gvidanto Xu Jialu parolos
- * Urb-estro de Pekino akceptos iujn kongresanojn
- * Vi povos lerni ĉinan lingvon en rapida kurseto "Ĉina Eksprese"
- * Vi povos tra-pasi inter-naciajn ekzamenojn
- * Vi povos lerni Esperanton per e-metodo. e-metodo estas direkta instruado. Nome, oni ne uzas nacian lingvon dum instruado.
- * Vi povos aŭdi librojn en libro-servo kaj tie vi povos vidi verkintojn de iuj libroj.
- * Oni okazigos malfermon de la arbareto "Esperanto-Bosko" en Chaoyang (Ĝang-jang)-parko. Tie oni starigos tonon pri Esperanto.
- * Antaŭ, post kaj dum la kongreso oni vizitos belajn kaj interesajn lokojn en kaj ĉirkaŭ Pekino kaj al aliaj lokoj.
Ĉiu-tage okazos tre multe, ĉu? Eble vi ne povos tra-vivi ĝin. Elektu tiujn okazaĵojn, kiu pleje interesas vin!
Plezuran tempon por vi dum nia UK!

Vortareto por komencantoj

akademio: daŭra societo aŭ organizo de artistoj aŭ sciencistoj
ateisto: nekredanto de dio; ne-religiulo
artoto: verkinto de iu artikolo aŭ libro
balo: kun-veno kun dancoj
bankedo: komuna manĝo
bel-arto: literaturo, muziko, arkitekturo (arto de konstruado) skulptado kaj pentrado
beletro: literaturo
bosko: malgranda arbaro
ceremonio: klare vid-ebla montriĝo de graveco de iu afero
delegito: reprezentanto; delegito laboras por alia homo aŭ organizo
di-servo: servo al dio; ceremonio de religiuloj

ekskurso: vizito al interesaj lokoj
ekspozicio: publika el-montrado de objektoj
ekspresa: rapida; "Ĉina Eksprese" estas rapida kurs-eto pri ĉina lingvo
ekumena: pri tuta kristana mondo
ekzameni: Kiam oni ekzamenas vin, oni faras demandojn sur papero aŭ per parolado al vi. Se vi respondas plej-parton de ili ĵuste, vi tra-pasos la ekzamenon; alie vi ne tra-pasos.
esperantologio: scienco pri la lingvo Esperanto
forumo: publika diskutejo
fumi: (vidu bildon)
gi-eto: gi-eto estas fenestro; egi-eto oni helpas vin per respondo al viaj demandoj aŭ per aliaj servoj.
go-ludo: go estas japana transskribo de ĉina vorto "weiqi" (*vej ĵi*). Du homoj ludas per nigraj kaj blankaj pecoj sur tabulo. La tabulo havas 361 krucojn. La homo kiu okupas pli multe da krucoj venkas la ludon. (vidu bildon)
emelo: emeloj naskiĝis samtempe de la sama patrino; emelaj urboj estas amikaj urboj
halo: publika ambrego en hotelo
ILEI: Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj
inaŭguro: komenco, malfermo
ju: i: decidi, u: iu estas prava aŭ malprava, io estas bona aŭ malbona
kandidato: ebla elekt-oto; se vi estas kandidato, oni eble elektos vin kiel efo/estro se plimulto de elektantoj diras "jes" por vi.
klara: klara homo scias multe kaj povas bone pri-juĝi aferojn; klar-iga: eduka, scio-dona
koment(ari): klar-igi ies opinion pri io aŭ iu
komisiono: mem-stara organizo kiu studas certan demandon aŭ plen-umas certan taskon
komitato: aro da elektitaj membroj por studi iun aferon. LKK (Loka Kongresa Komitato) estas homoj, kiu kune preparas ĉion por UK (Universala Kongreso de Esperanto)
koncerto: muzika prezentado
konferenco: kun-sido por diskuti gravajn aferojn
kongreso: granda kunveno
konkuri: peni superi alian por sama celo (ekzemple, premio); En konkuro de kurado oni la plej rapide kuras por esti la plej rapida kuranto. En konkuro de kantado oni opinias la plej-bele-kantanton la plej inda.
konkurso: konkurado
kontroli: studi uio estas ĵusta
konversacio: inter-parolo
krokodili: ne paroli Esperanton kun esperantistoj
magio: arto fari miraklojn
medicino: arto por forigi malsanojn; kurac-arto
metodo: kiel
oratoro: parolanto en publika kun-veno
patrono: influa protekt-anto de grava afero aŭ organizo
piano: (vidu bildon)



potenco: forto povanta efiki en estonteco
prelego: instrua parolado pri scienca aŭ arta temo
prezidi: konduki, direkti diskutojn; Prezid-anto estas estro (efo) de organizo, societo kaj similaj. Prezid-anto estas la plej alta gvid-anto de UEA (Universala Esperanto-Asocio).
rekomendi: Se mi rekomendas iun libron, mi laŭdas ĝin por ke vi aĉetu aŭ legu ĝin. Se mi rekomendas iun personon al vi, mi laŭdas lin/in por ke vi kreu lin/in taŭga.
religio: kredo je dio(j); la kredo de iuj homoj, dio troviĝas kie kaj povas fari ĉion. kredoj je malsamaj dioj estigis malsamajn religiojn. En iuj landoj la plejmulto de la popolo kredas je la unu sama religio (kristanismo, islamismo, budaismo, aŭ alia). En ĉinio oni povas kredi je iu ajn religio aŭ neniun religio. Ĉinaj religioj estas egalaj kaj liberaj. Kredantoj kaj nekredantoj de religioj estas amikoj.
reto: Oni kaptas fiŝojn per reto (vidu bildon). Inter-lig-ita aro da homoj ag-antaj por komuna celo;
salono: ambro por akcepti vizitantojn; ambro por kun-veno
sekretario: Sekretario plen-umas skribajn aferojn por organizo aŭ persono. En iuj organizoj sekretario estas estro.
seminario: Seminario estas kurso. En seminario oni instruas kaj diskutas en grupoj.
simpozio: Simpozio estas kuniĝo de homoj kun scio pri sama scienco aŭ arto aŭ homoj kun sama intereso. En simpozio oni diskutas pri fakaj aferoj.
solena: solena ceremonio estas ofte tre brila, videble grava.
spektaklo: interesa prezentado aŭ vidaĵo
strategio: arto fari planon de milito; arto por atingi celon
TEJO: Tutmonda Esperanta Junulara Organizo
terminologio: scienca studo pri teknikaj vortoj
universala: tut-monda; inter-nacia; UK - universala kongreso de Esperanto
vegetarano: Vegetarano manĝas nur plantaĵojn, sed ne manĝas viandon (bova on, aŭta on, koka on, fiŝa on, ktp); iuj vegetaranoj tamen manĝas ovojn kaj mielon.
voĉ-doni: diri por aŭ kontraŭ kandidatoj en elekto



Forta Voko 2

Kuriero de 89a Universala Kongreso de Esperanto

via ĉiutaga ĵurnaleto

dimanĉo 25a de julio, 2004

Saluto el UNESKO

Mesaĵo de Vica Direktoro-ĝenerala de Unesko Okaze de la Nitobe-Simpozio kun la Temo "Lingvaj Problemoj en Internaciaj Organizoj" en Pekino de la 25-a ĝis la 27-a de Julio, 2004, (kadre de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto de la 24-a ĝis la 30-a de Julio, 2004)
Temo: Lingvo kaj Eduko por Paco kaj Internacia Interkompreno

Mi volas adresi al vi mian mesaĝon okaze de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto. Efektive, ĉi tio ne estas la unua fojo, ke Unesko asocias sin al ĉi tiu evento, kies hodiaŭa temo estas "Lingva egaleco en Internaciaj rilatoj".

Tio estas temo, kiu figuras inter niaj zorgoj, tiom pli klarar la objektivoj de niaj du organizoj konverĝas direkte al la sama celo: paco en la mondo.

I-jare la Simpozio pritraktas la temon, "lingvoj, uzataj en internaciaj organizoj", inkluzive Uneskon, kaj mi povas certigi vin, ke ni atentis kun intereso la konkludojn de ĉi tiu laboro.

La homaro posedas kiel senmaterian heredaĵon tiun mirindan ilon, kiu estas lingvo, por antaŭenigi internacian dialogon kaj interkomprenon. Pro tio Unesko senĉese laboras por konservado de kultura kaj lingva diverseco kaj por evoluado de plurlingva edukado per siaj edukaj programoj kaj projektoj.

La Universala Deklaro pri Kultura Diverseco, adoptita unuanime en la 30-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko in 2001, atestas la volon de ĉiuj membroŝtatoj antaŭenigi lingvojn kiel vehiklon de dialogo, paco kaj internacia interkompreno.

Cetere, en la Uneska kadra dokumento "Edukado en Plurlingva Mondo", publikigita en ĉiuj ses laboraj lingvoj, ni montras klaran starpunkton koncerne la lingvan politikon, aplikotan en edukado. Ni invitas niajn membroŝtatojn kaj asociintajn membrojn uzi la denaskan lingvon kiel la lingvon de instruado en la elementa lernejo. Krome, sekve de la decido de la Uneska Ĝenerala Konferenco en sia 30-a sesio en 1999 proklami la Internacian Tagon de la Denaska Lingvo, tiu tago estas celebrata en la membroŝtatoj kaj asociintaj membroj ĉiujare la 21-an de februaro.

Tiu kadra dokumento tradukiĝis en lokajn lingvojn en certaj landoj, kaj publikante ĝin, Unesko esperas kontribui al la ideoj de paco per instigado de evoluo de plurlingva edukado. Rekono de lingvo diverseco estas la bazo de la decido de Unesko celebri la Internacian Tagon de la Denaska Lingvo ĉiujare la 21-an de februaro.

Siaflanke Universala Esperanto-Asocio laboras ankaŭ por pli kaj pli vasta kaj multa uzado de Esperanto tra la mondo. Efektive, uste pro sia naturo de internacia komuna lingvo, ne trala rilate al "naturaj" lingvoj, ĉi tiu konsiderinde kontribuas al alproksimigo de popoloj kaj al subteno de iniciatoj por lingva kaj kultura diverseco cele al mondopaco.

Niaj du organizoj daŭrigas kombinos siajn klopodojn cele al interkompreno de la popoloj de la mondo.

Mi deziras por vi bonegan simpozion kaj sukcesoplanan kongreson!

(subskribo)
John Daniel

Gazetara konferenco de la 89-a UK

La konferenco okazis posttagmeze 24a julio. Guo Xiaoyong ĉeestis kaj parolis en ĝi. R. Corsetti kaj Tan Xiuzhu respondis demandojn de raportistoj.



Malfermiĝis la ekspozicio "Konu Ĉinion, vizitu belan Pekinon"

Je 14-a horo de la 24-a de julio 2004 malfermiĝis en la Pekina Internacia Konferenca Centro la ekspozicio "Konu Ĉinion, vizitu Belan Pekinon". Ĝin ĉeestis s-ro Renato Corsetti, prezidanto de UEA, s-ro Zhao Qizheng, ministro de la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, s-ro Li Dan, direktoro de la Ĉina Radio Internacia kaj vicprezidanto de la honora komitato de la 89-a UK, s-ro Chai Zemin, prezidanto de la Ĉina societo "Amikoj de Esperanto", s-ro Wang Hui, direktoro de la Informa Oficejo de Pekino kaj pli ol 200 esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj.

La malfermon prezidis s-ro Guo Xiaoyong, konstanta vicprezidanto de la Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj ĝenerala sekretario de la Honora Komitato de la 89-a UK. S-ro Cai Mingzhao, vicministro de la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, parolis. Li konigis al la vizitantoj la ekspozicion. Li diris, "Morgaŭ matene malfermiĝos la 89-a UK. Pli ol du mil kongresanoj el pli ol 50 landoj kolektiĝas en Pekino. 18 jaroj forpasis post la 71-a UK okazinta en Pekino en 1986. Dum tiuj 18 jaroj multe ŝanĝiĝis la mondo, multe ŝanĝiĝis Ĉinio kaj ĝia ĉefurbo Pekino, multe ŝanĝiĝis ankaŭ la internacia E-movado. Pro tio, UK en la sama formo okazonta en la sama urbo devas havi novajn enhavon kaj etoson." En la nomo de LKK, li dankis ĉiujn pro ilia afabla ĉeesto kaj deziras plenan sukceson al la 89-a UK. Ĉina Centra Televido intervjuis s-ran Renato Corsetti.



Salutas nin veteranaj Esperantistoj en Pekino

24 julio 2004

Karaj samideanoj,

Ni, ĉinaj veteranaj esperantistoj, esprimas nian koran gratulon al la 89a Universala Kongreso de Esperanto. Ekde la juneco ni lernas Esperanton kaj aktive nin dediĉas al la Esperanto-movado en Ĉinio. Dank' al tiu lingvo ni lernis multe kaj konatiĝis kun samideanoj el multaj partoj de la mondo. Ni ja deziras kuniĝi kun vi en la kongresejo. Bedaŭrinde estas neeble por ni partopreni en tiu-ĉi kongresejo pro maljuneco aŭ malsano. Tamen ni deziras, pere de vi, brilan sukceson al la Kongreso kaj nia lingvo.

Amike,

Zhang Ziguang, Xu Hongjiu, Zhao Guiyong, Liu Daosheng, Huang Ke, Li Wen, Mei Luo, Zhang Tianxin, Sun Keding, Xu Kezhao, Zhang Depu, Zhang Deyuan

Ĉinoj Kantas

Ĉiu lingvo estas bel-sona en sia propra maniero. Iuj lingvoj belas per forta kaj malfora silaboj, iuj per longa kaj mallonga silaboj, iuj per alta kaj malalta silaboj, ktp. Ĉina lingvo belas per ŝanĝoj de tono sur ĉiu silabo! Estas kvar tonoj: flata, leviĝanta, fala-leviĝanta kaj fala: —, /, \ kaj \. La tonoj igas la frazojn melodia. Tial okcidentanoj ofte diras ke ĉinoj ne parolas, sed kantas. Se vi interesiĝas pri tio, vizitu la kurseton *Ĉina Eksprese* (15:30-16:15, *Wensing*). La kurseto daŭros morgaŭ kaj postmorgaŭ.

Ekspozicio de Esperantaĵoj en Domo de Guo Moruo

La 20a julio, Pekina Esperanto-Asocio malfermis bildo-ekspozicion *Esperanto kaj Kulturaj Gravuloj* en la memor-halo (iama loĝejo) de Guo Moruo (gŭo moŭo). La ekspozicio prezentas kiel Lusin, Cai Yuanpei, Guo Moruo, Chunchan Yeh (Cicio Mar), Bakin, Mao Dun subtenas Esperanton. La memorhalon de Guo Moruo oni vizitas dum la duon-taga ekskurso dum ĉi-foja UK. La ekspozicio donos al Esperantaj vizitantoj informon pri Esperanto-movado en Ĉinio. Guo Pingying gŭo pingjing), filino de Guo Moruo kaj kuratoro de la memor-halo, subtenas la ekspozicion. (WYJ)

Ĉu vi scias kiu estas Guo Moruo?



Guo Moruo (1892—1978), granda poeto, historiisto, bel-skribisto, dramisto. Li estis prezidanto de Ĉina Akademio de Sciencoj. Liaj dramoj *Qu Yuan* kaj *Bronza Tigro* estis esperantigitaj de Li Shijun (Laŭlum) kaj Xie Yuming (Seimin).

Evoluo aŭ revolucio?

S-ro Li Shijun (Laŭlum) prelegos pri **evoluo de Esperanto**. Li diras, ke oni uzas *milion* anstataŭ *miliono*, *spit* anstataŭ *spite al*, ktp. Ĉu tio estas evoluo aŭ revolucio? Aŭdu lian prelegon kaj donu vian opinion. (13:00-14:00 Wensing).



Kongresanoj en akceptejo en la kongresejo, matene 25a julio

Redakt-anto petas vian pardonon!

Pro urĝeco de nia laboro kaj manko de kontrol-legantoj, eraro troviĝis en la hieraŭa numero de nia ĵurnaleto. En la **Vortareto por komencantoj**, sub la vorto **Simpozio**, "En simpozio oni diskutas fakaj aferoj" devas esti "...diskutas **pri** fakaj aferoj".

Aŭtora duonhoru kun Spomenka Ŝtimec

Dimanĉon posttagmeteze komenciĝos la unua ero el la serio de renkontiĝoj de verkistoj kun la kongresanoj. Verkistino **Spomenka Ŝtimec** el Kroatio gastos en la Libroservo dum la aŭtora duonhoru je la 17a horo la 25an de Julio 2004. Ŝi prezentos siajn verkojn kaj legos fragmenton el ili. Speciala gasto de ŝia aŭtora duonhoru estos ĉina tradukisto el Esperanto s-ro Shi Chengtai kiu kune kun japano Kurisu Kei kaj Spomenka Ŝtimec realigis projekton de eldono de la libro *7000 Tagoj en Siberio*. La libro estis per Esperanto tradukita en la ĉinan.

Kroata literaturo la unuan fojon estis prezentita al ĉina publiko per Esperanto en la jaro 1936 en Ŝanhajo. Nun denove kroataj verkoj alproksimiĝas al ĉinaj legantoj per Esperanto.

Esperanto servas kiel lingvo-ponto. Bonvenon al la programo!

Kantu en la Internacia Koruso (IK)

Venu kaj ĝoju kanti en Esperanto!

Ne bezonatas havi muzikan talenton

ĉar ni helpas vin lerni kelkajn kantojn.

La unua kunveno de la IK okazos dimanĉon, 14:30, en salono Lapenna. Bonvenon!

Alan Bishop (kn 245), gvidanto de la IK.

PROGRAMO DE TAGO DE LA LERNEJO

Pekino, mardo, 2004-07-27, 11h00-16h00

Prezidas: Jennifer Bishop – Ĉiuj interesatoj bonvenaj

Asistas: Hazel Green

11h00-11h05 Malfermo (J. Bishop)

11h05-11h35 Liu Xiaojun pri lernaja sistemo kaj lingvoinstruado en Ĉinio

11h35-11h45 Diskuto

11h45-12h00 ISIKAWA Teiko: Instruado de Esperanto en Japanaj lernejoj

12h00-12h30 Diskuto

12h10-12h20 Jennifer Bishop, Hazel Green: Lingvoinstruado en Aŭstralio

12h20-12h30 Diskuto

12h30-13h00 Katalin Kovats: ESF – subtenanto de lingvoinstruado (prelego kaj diskuto)

13h00-14h00 Lunĉ-paŭzo. En la konferenceto funkcias ILEI-budo kaj libera diskutejo

Dejoras Hazel Green kaj Jennifer Bishop

14h00-14h10 Ronald Glossop; Edukado al paco

14h10-14h20 Diskuto

14h20-14h35 Mireile Grosjean: Edukado por solvado de konfliktoj

14h30-14h40 Diskuto

14h40-14h50 Mireile Grosjean: Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA – evoluo kaj signifo por la Esperanto-kulturo

15h00-16h00 ILEI tutmonde 55 jarojn post la fondiĝo – enkonduka komunikaĵoj kaj diskuto pri ILEI kaj E-agado en E-eduka kampo

EKSKURSAĴOJ ATENTU!

1. La **duontagaj ekskursoj** planitaj por la dimanĉa mateno okazos **lunde matene**. Se sur via ekskursbileto estas la indiko ke ĝi okazas dimanĉe, bv. ne konsideri ĝin, kaj iri lunde matene antaŭ la kongresejo je la 08h15 por partopreni la ekskurson.

2. La kongresanoj kiuj **mendis** kaj **pagis** por la **tuttagaj** kaj **duontagaj ekskursoj** kaj **ne ricevis** la ekskursbiletojn kun la nomŝildo, **ne bezonas peti anstataŭajn biletojn** ĉar ĉiuj personoj kies nomoj estas en la nomlisto de la ekskursoj eniros la aŭtobusojn senprobleme. Vi povas kontroli ĉu via nomo estas en la ekskurslitoj ĉe la tabuloj en la teretaĝo.

3. **TRE ATENTU** la ĝustajn ekir-horojn de la subaj ekskursoj. Sur la ekskurs-bileto la horoj estas malĝustaj. Jen la korektaj horoj:

D1-dimanĉe = 13h30

D1-lunde = 13h30

D2-dimanĉe = lunde 08h30

D2-marde = 13h30

D3-dimanĉe = 13h30

D3-ĵaŭde = 13h30

D4-dimanĉe = lunde 08h30

D4-marde = 13h30

D4-vendrede = 08h30

D5-marde = 13h30

D5-ĵaŭde = 13h30

D6-dimanĉe = lunde 08h30

D7-lunde = 13h30

D7-vendrede = 13h30

**Se vi estas komencanto, legu nian ĵurnaleton!
Se vi bone parolas Esperanton, legu nian ĵurnaleton!**

Kunsido de Subkomitato 2 (Eksteraj Rilatoj) okazos je 14:00-15:30 en lundo, 26a julio ĉe la salono Chu Tunan, ne en dimanĉo, 25a julio.

Aŭtora Duonhoru(6)

Verkoj de Elpin de CHOE Daesuk

Rubriko Esperanto de LEE Chong Yeong

Je 11:30, 29a julio e la Libroservo (*Lusin*)

Nitobe-Simpozio pri la Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj

komenciĝos ekde 14:00 25 julio ĉe Salono Chu Tunan. La 10 prelegoj, inkluzive 30 ĉinaj prelegantoj, estos samtempe intepretotaj en tri lingvoj, Esperanto, ĉina kaj angla. Tiuj kiuj ne bone regas Esperanton ankaŭ estas bonvenaj.

KLERIGA LUNDO

Lunde matene okazos serio da malgrandaj kun-sidoj speciale organizataj por *vi!!!* Venu kaj informiĝu kaj informu pri Kulturo - movado - la ekstera mondo - utiligado! Konataj internacie aktivuloj enkondukos la temojn kaj ĉiuj kontribuu per propraj spertoj!

Je la 9-a horo vi povas elekti inter **Nia historio**. *Hujucz, Kiel verki artikolojn. Chen Yi, Aliri kaj konvinki politikistojn kaj funkciulojn. Ĵelezo, Infanoj en Esperantujo. Wensing.*

Je 10:45 vi povas elekti inter **Verkado en Esperanto**. *Chen Yi, Animi landajn asociojn. Hujucz, Esperanto:Ĉu eŭropa lingvo? Ĵelezo, Reta mondo. Wensing.*

Je 12:30 vi povas elekti inter **Oratori en Esperanto**. *Ĵelezo, Kiel organizi internaciajn aranĝojn. Hujucz, Esperanto kaj tutmondiĝo. Wensing*

La estraranoj respondecaj pri la Kleriga Lunda Pekino 2004 estas Michela Lipari kaj Humphrey Tonkin, al kiuj vi direktu eventualajn demandojn.

Elektu la kunsidojn! Kleriĝu kaj klerigu la aliajn!
Por ĉiuj demandoj. Michela Lipari KN18.



Esperantistoj el diversaj landoj en la **Interkona Vespero**, 25a julio.

Kiel raporti?

Skribu: kio okazis? kie? kiam? kiuj (kiom da personoj) ĉeestis? kiel? kiel vi/oni pensas pri la okazaĵo? ktp.

Skribu klare kaj mallonge! Laŭeble uzu ĉiutagajn vortojn.

Malfermo de la 89-a UK



1904 samideanoj el 51 landoj venis al la malfermo de la 89-a UK je la 10 horo, matene de la 25-a de julio en la halo Zamenhof, en la Pekina Internacia Konferenca Centro. Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola

Kongreso kaj alta protektanto de la kongreso Wu Bangguo letere salutis la kongreson. Vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato ĉi-foja UK Xu Jialu ĉeestis kaj faris kuraĝigan paroladon. Venis ankaŭ ĉiuj estraranoj de UEA, ĉinaj gvidantoj Zhao Qizheng, Cai Mingzhao, Guo Xiaoyong, Chai Zemin, Lin Wenyi, Li Dan kaj aliaj.

Ĉeestis ankaŭ ambasadoroj, kaj aliaj oficistoj el multaj ambasadorejoj. Zhao Qizheng, ministro de la ĉina ŝtata Informa Oficejo kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 89-a UK, laŭtlegis salutvortojn de Wu Bangguo. Li diris, ke en la pasintaj pli ol cent jaroj pacamaj esperantistoj laboris por disvolvi Esperanton. Lernantoj de Esperanto pli-multiĝis. Esperanto estas uzata por pli kaj pli da aferoj. Esperanto jam bone servas en kultura interŝanĝo kaj scienc-teknika kunlaboro kaj ludas apartan rolon en la internaciaj rilatoj. Ĉeestantoj varme aplaudis.

Oni ridas

Xu Jialu diris, ke Esperanto estas tre utila ilo por ni ĉiuj, dum UK donas al ni bonan ŝancon por koni aliajn landojn, aliajn kaj aliajn naciojn. La nuna kongreso estos utila al ĉiuj kongresanoj por koni kaj kompreni Ĉinion kaj la ĉinan popolon. Li diris al la ĉeestantoj, ke post la kongreso la kongresanoj povas fiera diri: "Mi jam konatiĝis kun la lando, kies loĝantoj konsistigas kvinonon de tiuj de la mondo." "Nun estas plej varme en Pekino. Mi kredas, ke vi jam spertis tion. Mi petas vin preni la varmecon de la vetero kiel amikecon de la ĉina popolo al alilandaj gastoj. Akceptu kaj spertu ĝin, kvankam vi ankoraŭ ne povas alkutimiĝi al ĝi." Oni gaje ridegis kaj aplaudadis por lia amuza parolado (Parolado de Xu Jialu aperos poste).

S-ino Lin Wenyi laŭtlegis salutvortojn de urbestro de Pekino Wang Qishan.

Vicprezidanto de UEA Lee Chong-yeong laŭtlegis leteron de vica direktoro ĝenerala de Unesko. La letero diris ke Unesko sen-lace laboras por konservi kulturalan kaj lingvan diversecon kaj por evolui plurlingvan edukadon. UEA laboras por pli kaj pli vasta kaj multa uzado de Esperanto tra la mondo.

Ankaŭ nepo de L. L. Zamenhof, nia majstro kaj kreinto de Esperanto, sendis sian bondeziron.

En mallonga ripozo oni aŭdis ludon de ĉina muzikilo *pipa* (bivo).

Vicprezidanto de UEA Humphrey Tonkin klarigis la kongresan temon "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj". Li deziris, ke kongresanoj partoprenu diskuton. Li diris ke Esperanto estas anstataŭaĵo de internacia uzo de naciaj lingvoj. Ĉar Esperanto estas pli facile lernebla ol multaj aliaj lingvoj, ĝi ne postulas tiel grandan investon kiel la lernado de aliaj lingvoj. Se ĉiuj homoj uzus Esperanton por la internaciaj kontaktoj, ili ĉiuj troviĝus sur sama nivelo. Esperanto estas utila por ĉiuj celoj. Ĝi povus krei elementon de egaleco en la internaciaj rilatoj." Li diris: "Multaj homoj diras, ke Esperanto estas nur revo. Nur 'bela sonĝo'. Ili venu al nia Universala Kongreso. Ĉi tie ili trovos homojn, kiuj parolas kaj uzas la lingvon – homojn, kiuj ne revas aŭ sonĝas, sed estas plene vekaj. Por ni, Esperanto ne estas iu utopio, sed praktika realaĵo. Tamen, se vi volas konvinki la mondon, ke Esperanto estas praktika solvo al la problemo de malegaleco de lingvoj, ni devas fronti kaj kompreni la kontraŭargumentojn; ni devas koni la faktojn; ni devas perfektigi nian propran komprenon. Pro tio ni diskutos la demandon 'Lingva egaleco en internaciaj rilatoj.'" Tonkin diris: "Ni elektis tiun temon ĝuste por la Pekina kongreso ĉar ni opinias, ke tie ĉi en Ĉinio oni bezonas Esperanton."

Diverslandaj esperantistoj salutis la kongreson kaj montris bondezirojn.

Ĉi tie en Ĉinio, oni investas grandegajn sumojn je la lernado de la angla, kun nur parte sukcesaj rezultoj – kaj nur por atingi la saman nivelon kiun la denaskaj parolantoj de la angla lingvo atingas kiel etaj infanoj. Kaj ju pli da ĉinoj lernas la anglan lingvon, des pli da avantaĝoj havas la denaskajn parolantojn de la angla kaj la anglalingvaj landoj.

H. Tonkin



Salutvortoj de Wu Bangguo al la 89-a UK

Okaze de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, en la nomo de la ĉina registaro kaj la ĉina popolo kaj de mi mem mi kore salutis la kongreson kaj varme bonvenigas ĉiujn amikojn el diversaj landoj.

Lingvo estas la plej grava instrumento por esprimi homajn ideojn kaj fari komunikadon. Kun progreso de la homa socio disvolviĝas kontinue ankaŭ la lingvo. Por forigi lingvan baron kaj akceli interkomprenon kaj amikecon inter la diversaj popoloj, antaŭ cent dek sep jaroj doktoro L. L. Zamenhof kreis la internacian helpan lingvon Esperanto kaj per tio faris elstarajn kontribuojn al disvolviĝo de la monda lingvo. En la pasintaj pli ol cent jaroj la pacamaj esperantistoj de diversaj landoj faris senlacen penadon por perfektigi kaj disvolvi Esperanton. Pli kaj pli kreskis la nombro de ĝiaj lernantoj kaj uzantoj kaj pli kaj pli grandiĝas la tereno de ĝia aplikado. Esperanto jam fariĝis efika portanto de la kultura interŝanĝo, informa komunikado kaj scienc-teknika kunlaboro kaj ludas apartan rolon en la internaciaj rilatoj.

Ĉinio estas lando kun miliardo kaj tricent milionoj da loĝantoj. Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion antaŭ cent jaroj. En tiu centjara historio kaj precipe post ekpraktikado de la reformado kaj pordmalfermo Esperanto multe progresis. Ĉinio faris kontribuon al disvolviĝo de Esperanto.

En 1986 Pekino sukcese gastigis la 71-an UK. Post 18 jaroj esperantistoj el diversaj landoj kaj diversaj nacioj kun malsamaj lingvoj refoje kolektiĝis en Pekino por kune diskuti pri disvolviĝo de Esperanto. Tio faros realan kaj profundan influon al interkompreniĝo, amikeco, mondpaco kaj homa progreso.

Mi kore deziras, ke niaj amikoj el diversaj landoj ĝuu la restadon en Ĉinio.

Plenan sukceson al la kongreso!

Wu Bangguo

Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko
Alta Protektanto de la 89-a UK
La 23-an de julio, 2004

Omaĝe Al La 89-a UK

Li Changlu (kn 0435)

La mirinda kaj pompanta UK
Estas la kongreso sen traduko.
Parolante lingvon unu-nuran
Oni aŭdas voĉon la plezurano.
Inter ni foriĝas naci-limo,
Ĉe ni restas amo kaj estimo.
Kongresanoj sub ĉielo suna,
Banas sin ĉiu en fest' komuna.

Vi ne krokodilu kun voĉtril'.
Vi ne timu pro balbuta buŝo,
Ĉiu ja eklernis kun vortfuŝo.
Uk-o rolas kiel famili'
Granda, fratof estas ĉiuj ni.
Dancu ankaŭ kantu ni ridante,
Firmas amikeco ja konstante.

Venas vi de l' hejmo en Azio,
Kaj mi fore el Oceanio,
Kaj li malproksime de Eŭropo,
Flugas de Afrik' ŝi kun galopo.
Batas eĉ en Amerik' la koro
De esperantistoj kun fervoro.
Kolektiĝas ni el tuta mondo
Cele al la amikeca fondo.

La espera lingvo — Esperanto
Pluen marŝu jen sub l' Ĉina Banto*.
Novan senton ligas l' antikvaj',
Urgas ege puls' de l' koro tuj.
Firmamente brilas Verda Stelo,
Glitas mare l' esperplena velo...
Dissemiĝas ĉien la esper',
Kreskos pompe verda la afer'.

Ni esprimas sentojn en babil',

* Ruĝa korforma plektaĵo simbolanta bonaŭguron.

Arbareto "Esperanto-Bosko" en Chaoyang-Parko

Dum i-foja UK, okazos la malfermo de Esperanto-Bosko en Chaoyang(ĉaŭjang)-parko, Pekino, matene en mardo, 27a de julio.

Chaoyang-parko situas en la nord-orienta parto de Pekino. La parko kiu kovras 2.93 kvadratajn kilometrojn, pli granda ol la Somera Palaco je 0.03 kvadrata kilometro, estas la plej granda parko en la urbo. La parko havas akvo-kovritan areon de 0.64 kvadrataj kilometroj. La parko konsistas el la centra regiono por diversaj aktivadoj, kaj regionoj por fizika kulturo, por ekologia protektado kaj popular-sciencia eduko, por diversaj servoj, por

amuzado, por administrado kaj la protektata regiono de antikvaj konstruaĵoj.

La tersurfaco de 1.34 kvadrataj kilometroj en la parko jam estas arbarumita. Tio kontribuos al plibonigo de la ekologian medion de la urbo. La 0.67-kvadrat-kilometra verdejo en la parko havas kvin partojn. Ili estas artfajra spaco, kuraĝ-ula areno, spaco "jarcento" kun ŝpruca fonto, vasta arbaro, kaj belo de Eŭropo.

Nia arbareto "Espranto-Bosko" staras en la lasta regiono.

FONDO DE NOVA ESPERANTO-ORGANIZO

Dimanĉe (25a de julio, 14:45 – 15:30) dum la 89a UK, Pekino, en la salono Chen Yi okazis faka kunveno por fondo de "MONDA ESPERANTA LIGO POR SPORTO" (MELS).

La ĉefaj celoj de MELS estas:

1) Disvastigo de Esperanto inter la praktikantoj kaj ŝatantoj de sportoj kaj batalartoj;

2) Popularigo de sportoj kaj batalartoj pere de Esperanto.

En la kunsido partoprenis ĉirkaŭ 40 ŝatantoj kaj praktikantoj de pluraj sportoj kaj tradiciaj batalartoj. Estas elektitaj du estraranoj de la ligo:

Prezidanto: **Klarita Velikova**, klinika psikologo el Bulgario/Koreio, Korea tradicia Tekkjon 3a DAN, Ĵudo, *Kumdo*, *Kukung* (Korea tradicia arkpafado), Hosinsul (Korea sindefendsistemo)

Retadreso: rta@eses.net, senfine@yahoo.com

Sekretario: **Jürgen Kloker**, policisto el Germanio,

Allkampf-ĵicuo 2a DAN, Ĵujicuo 1a DAN, Tekŭondo,

Retadreso: jkloker@yahoo.de

Dezirantoj aliĝi al la ligo kontaktu Prezidanto aŭ Sekretario.

Distingo inter KAEM1 kaj KAEM2

KAEM1 (Ĵaŭdo, 9-10 Chunchan Yeh)

Azia agado. Raportoj de landaj asocioj kaj diskutoj pri la azia movado

KAEM2 (Ĵaŭdo 12-13:30 Hujucz)

Aziaj landoj. Prezentoj de kulturoj de partoprenantoj de aziaj landoj.

Tiuj, kiuj volas scii kaj diskuti pri E-movadoj en aziaj landoj, venu al

KAEM1. Interesitoj pri aziaj kulturoj venu al KAEM2. Hori Yasuo (KN 1151), Prezidanto de KAEM

Aŭtoraj duonhoraj Ludon ĉe Libroservo

11:30 **Manel Vinyals** prezentos sian novan libron *Esperanto en la Tornistro*

16:30 La konata tradukisto **Li Shijun** (Laŭlum) prezentos sian novan tradukon *Ĉe la Akvorando*.

Tajĝiĉuan: Sporto aŭ Filozofio

Se temas pri ia kulturo, oni antaŭ ĉio devas pripensi pri ĝia filozofia radiko.

La ĉina antikva filozofio regis la ĉinan kulturon kelkmil jarojn. La trunko

de la ĉina antikva filozofio estas Taj i-teorio. Taj i-teorio povas esti


simple klarigata el du punktoj: pri la vero kaj pri la metodo. **Zhang**

Jiping (89a UK KN:0317) prelegos 15:30-16:30 en salono *Hujucz*.

PREZENTADO DE LA LIBRO "ESPERANTO EN LA TORNISTRO"

TAGO: LUNDO 26 JULIO 2004

LOKO: LIBROSERVO DE UEA



Hodiaŭ, je la 11,30 matene, en la Libroservo (salono *Lusin*), Manel Vinyals el Hispanio parolos pri lia verkita libro "ESPERANTO EN LA TORNISTRO". Interesa kaj amuza libro pri lia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo en 79 tagoj kiu montras al ni ke en la mondo estas tiom da esperantistoj kiom ni bezonas.

La libro priskribas la vivaĵojn, problemojn, anektdojn, ktp. tiuj okazis en lia longa vojaĝo tra la mondo en 79 tagoj, (unu malpli ol la fama romano de Jules Verne) per la silka vojo kaj sen aviadilo.

ESPERANTO EN LA

TORNISTRO estas tre interesa libro por vojaĝantoj en kie ni povas revivi multajn kulturojn kaj vivajn sistemojn de la mondo. Ĝia legado estas tre amuza kaj interesa.

Ĝia titolo jam montras al ni se ni kunportas Esperanton en nia sako, facile povos ĉirkaŭvojaĝi la mondon en 79 tagoj.

La libro estas akirebla en la libroservo kaj la verkisto volonte subskribos por vi.

Kleriga Lundo

Bv. atenti ke la kunsidoj de **Kleriga Lundo** kiuj estas indikitaj por okazi en salono *Lapenna*, fakte okazas en **salono Hujucz**, en la tria etaĝo!

Hodiaŭa Vetro
Pluvo dumtage, 26°C

Kunveno de TADEN (dimanĉon, la 25an de julio, 2000, 13-13h45 en *Lapenna*). En la kunveno de nefumantoj ĉeestis 10 personoj, el kiuj kvin el la gastiganta lando. La sekretario peris salutojn de Jan Bemelmans, la prezidanto, nun ferianta en Ukrainio. Post skizo de la evoluo de TADEN, precipe antaŭ 10 jaroj startinta kiel "Agado", de 1996 "Asocio", ni aŭdis pri diverslandaj ŝanĝoj: Novjorkio estas malpli fumlibera ol ni supozis laŭ ĵurnalaj artikoloj, Montenegro vivas de kontrabando de "nigraj cigaredoj", tiuj fumvaroj en Francio devus esti blankegaj pro 3-foja prezaltigo ĝis 30%, en kelkaj japanaj regionoj jam furoras puraj pulmoj kaj Ĉehio planas tamen reveni al plia sanzorgo de antaŭ 1989: dum manĝohoroj en restoracioj oni ne fumu. Grava gajno por la asocio estas, ke regule venos informoj el Ĉinio, Japanio, Francio, Serbio kaj Usono.

Raportis Rob Moerbeek, kn 76



Ĉinoj pentras vortojn

Oni diras, ke ĉinaj karakteroj estas bildoj. Kvankam post longa evoluo hodiaŭ oni jam ne povas rekoni la objektojn reprezentataj de la karakteroj, tamen ili restas sufiĉe bildecaj. Aŭskultu rapidan kurseton *Ĉina Eksprese* (17:00-18:00 *Ĵelezo*)



Grava korekto !!!

Lasta vorto de la raporto "Malfermiĝis la ekspozicio 'Konu Ĉinion, vizitu belan Pekinon'" (dekstra kolumno, numero 2 de la kuriero Forta Voko) devas esti "H. Tonkin" anstataŭ "Corsetti".

Novaj aliĝoj

kn	Nomo	Adreso
1795	Zhang Qian	Beijingshi, 6317 xinxiang, zhongruan guojilvyouxu, Ĉinio
1796	Wu Jingli	Guangdong, Guang-zhou-da-dao-nan-yi-jing-cui-yuan -cui-lin-ju-11 zuo-6-F, Ĉinio
1797	Pan Xuemeng	Shan'xi-yangquan-shi yangmei-yi-zhong-chu-zhong-231-ban, Ĉinio
1798	Sun Zhixian	Beijing-chao-yang-xin-fang-cun-xin-fang-yuan-1332-hao, Ĉinio
1799	Chen Hongyu	Beijing-chao-yang-xin-fang-cun-xin-fang-yuan-1332-hao, Ĉinio
1800	Zhang Tiezheng	Suzhou-dong-gang-er-cun-38-zhuang-201-shi, Ĉinio
1801	Jia Wende	Qianghaisheng, Xi'ning-shi, Xi-guan-da-jie-60-hao, Ĉinio
1802	Jia Yan	Qianghaisheng, Xi'ning-shi, Xi-guan-da-jie-60-hao, Ĉinio
1803	Tao Xiaolin	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1804	Wang Aiyu	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1805	Zhang Li	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1806	Yu Zechen	Beijingshi, Chong-wen-qu-dong-hua-shi-bei-li-zhong-qu-4-hao-lou, Ĉinio
1807	Guo Qi	Beijingshi, Chong-wen-qu-dong-hua-shi-Bei-li-zhong-qu-4-hao-lou, Ĉinio
1808	Guo Chao	Beijingshi, Chong-wen-qu-dong-hua-shi-Bei-li-zhong-qu-4-hao-lou, inio

Poŝmarkojn por nia Kongreso

Ĉina Filatela Kompanio kaj Ĉina Esperanto-Ligo kune emisiis 800 kompletojn da poŝmarkoj speciale por la 89-a UK. Nun restas nur duono. Filatelistoj ne maltrafu la ŝancon. Mendu ĉe la informejo sur la unua etaĝo. Unu plena kompleto kostas 80 juanojn, kaj la speciala memorpapero 2 juanojn.





Homa Familio 4

Kuriero de 89a Universala Kongreso de Esperanto

via ĉiutaga ĵurnaleto

mardo 27a de julio, 2004

NITOBĖ – SIMPOZIO ADOPTIS REZOLUCION

La NITOBĖ-Simpozio kunvenis dum la 25 kaj 26 julio 2004 en Beijing (Pekino) kun ĉirkaŭ 50 partoprenintoj kaj 10 prelegintoj, veninte de diversaj internaciaj kaj naciaj instancoj, kaj adoptis la suban rezolucion kaj sugestas al UEA sendi tiun tekston al UN, UNESKO kaj al la registaroj de Ĉinio kaj de la membro-ŝtatoj de la Eŭropa Unio:

Rezolucio de Nitobe-Simpozio pri la Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj 25-26 julio 2004, Beijing

La internaciaj partoprenintoj de Nitobe-Simpozio pri la Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj, kiu havis lokon en Beijing, Ĉinio, dum 25-26 julio 2004,

- konstatante, ke demokratia kaj egalrajta lingva komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreniĝado kaj paca kunvivado surbaze de la egalaj lingvaj rajtoj, kaj

- konstatante, ke lingvaj homaj rajtoj estas esenca faktoro de internaciaj homaj rajtoj, kaj nuna monda lingva ordo kiu estas regata de kelkaj aŭ unu dominaj etnaj lingvoj malhelpas demokratian kaj egalajn lingvaj rajtojn, kaj

- alte taksante la favoran sintenon de la ĉina registaro por la egalaj internaciaj lingvaj rajtoj kaj por celi unuecon en diverseco de malsamaj kulturoj,

rezolucias:

1. ke serioza konsidero por establi novan internacian lingvan ordon estas necesa, kaj

2. ke Unuiĝintaj Nacioj diskutu pri la nuntempa lingvaj problemoj en internaciaj rilatoj dum unu el ĝiaj kunsidoj, kaj establu Porokaza (ad hoc) Laborgrupo pri la Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj por esplori la nuntempajn internaciajn lingvajn problemojn kaj rekomendi kiel plibonigi nunan internacian lingvan ordon, kaj

invitas, specife:

1. la ĉinan registaron kaj la registarojn de la membro-ŝtatoj de la Eŭropa Unio rekomendi al Ĝenerala Sekretario de UN enmeti la temon "Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj" kiel tagordero de unu el ĝiaj venontaj kunsidoj, kaj

2. ĉiujn internaciajn organizojn, registarajn kaj ne-registarajn asociojn agente en internaciaj rilatoj, apogi la proponon studi kaj organizi lingvajn eksperimentojn en universala help-lingvo por prepari justan kaj demokratian novan internacian lingvan ordon.

Vic-urb-estro Zhang Mao akceptas kongresanojn



Vespere dimanĉe 25a de julio vic-urb-estro de Pekino akceptis kongresanojn en bankedo kaj faris paroladon en ĝi.

Kio Okazis

La unua kunveno de UEA pri la projekto "Ĝemelaj Urboj"

Je la 12-a horo, 27-a de julio en la salono "Hujucz" kunvenis la projekto "Ĝemelaj Urboj". Tio estas la unua kunveno pri tiu kampo en la kadro de UEA. En ĝi estas aranĝotaj prezento pri jara raporto kaj sperto, kaj diskuto pri la onta evoluo de la projekto. Mi precipe atentigas vin, ke via partopreno kaj propono estas grava por progresigi la projekton. Wu Guojiang KN 0473

Hodiaŭa Vetero: serene kaj poste nube; pluvo kun tondro ĉe vesperiĝo, 34°C

Legantoj de (reta) EPĈ kun-sidis

Posttagmeze de lundo, la 26-a de julio a pli ol 50 legantoj de reta El Popola Ĉinio kun-sidisen salono *Lapenn*. Ili venis el Slovakio, Britio, Bulgario, Japanio, Nederlando, Koreio, Usono, Rusio, Aŭstralio, Svisujo, Svedio kaj Ĉinio.

Wang Lihua esprimis varman bonvenigon al ĉiuj ĉeestantoj. Eks-vic-ĉef-redaktanto s-ino Tan Xiuzhu diris, ke ŝi estis tre ĝoja renkontiĝi en la kunsido kun multe da malnovaj amikoj. Ŝi multe dankis samideanojn el diversaj landoj. Niu Xueqin diris: "Ĉiujare ni ricevas pli ol 2000 leterojn el pli ol 50 landoj kaj regionoj. Iuj el niaj legantoj skribis al ni por kontribui al la reta EPĈ, aliaj por doni al ni sugestojn kaj proponojn, triaj por aperigi korespond-anoncon, kvaraj por mendi Esperantajn librojn, kvinaj por peti helpon, ekz. aĉeti poŝtmarkojn, ĉinajn medicinaĵojn aŭ aliajn ĉinajn objektojn kaj sesaj nur por saluti nin."

La legantoj estas kontentaj pri nia reta revuo. Iuj faris proponon pri teknika progresigo de la reta revuo.

Fine fr-ino Chen Ji publikigis la rezulton de la verko-konkurso "Mi kaj UK" kaj sinjorino Tan Xiuzhu disdonis la premiojn.

Raportis Liu Caisheng KN1032

Kongresanoj vizitas malnovan hutong (strateton) de Pekino



DISTINGO DE ELSTARAJ MOVADANOJ

En sia unua kunsido sabate la 24-an de julio la komitato de UEA distingis kelkajn elstarajn esperantistojn per honoraj titoloj.

Eks-prezidanto de UEA S-ro Kep Enderbs (Aŭstralio) estis elektita kiel membro de la Honra Patrona Komitato de UEA. Ĝi konsistas el esperantistoj, kiuj havis eminentan pozicion eskster la Esperanto-movado. S-ro Enderbs estas eksa ministro pri justico de Aŭstralio.

La elstara ĉina esperantisto Li Shijun (Laŭlum) fariĝis honora membro de UEA. Aliaj novaj honoraj membroj estas la rusa aktivulo Vladimir Samodaj, la iama KKS Gian Carlo Fighiera (Italio), la unua prezidanto de Kaem Takeuti Yosikazu (Japanio), eksprezidanto de UEA Lee Chong-Yeong (Korea resp), Esperanta pedagogo Maria Saturova-Seppova (Slovakio) kaj la blindula aktivulo Jiri Vychodil (Ĉeĥio).

Kunveno de I.K.E.K dimanĉe 15:45-16:30

Sub prezido de Stan Keable (KN 926) kunvenis pli ol 40 interesitoj, por diskuti la kongresan temon de lingva egaleco, kio ja ankaŭ tuŝas la tutmondan komunisman movadon. Iu levis demandon pri socialisma karaktero de Ĉina Popola Respubliko, aliu postulis ke ni lernu de kapitalistoj. Por tiaj debatoj ekzistas forumo en la gazeto "Internaciisto" kaj almenaŭ ekzistas kelkaj verkoj pri komunismo kiel la manifesto de komunista partio. Raportis Dieter Brooke KN 89

Parolu, komencantoj!

Iuj tim-emaj komencantoj ne kuraĝas paroli Esperante. Ili krokodilas. Tio ne estas bona. Sciu, ke ankaŭ komencantoj povas paroli! Mankas al vi kuraĝo kaj ne kapablo. Ĉu vi faros erarojn? Jes, sed ankaŭ aliaj faras erarojn. Kiam vi parolas, vi ankaŭ aŭdas. Per aŭdado vi lernas kiel aliaj parolas. Do viaj eraroj ne ĉiam restos. Provu! B-b-bal-l-b-b-but-tu! Mal-bone parolanto fariĝos bona esperantisto, sed ne-parolanto progresos malrapide. Se vi ne volas esti ĉiama komencanto, parolu ek-de nun!

Tibetaj esperantistoj

Dekses tibetaj studentoj de la Pekina Tibeta Mezlernejo jam lernas Esperanton tri monatojn. Ili venis al tiu-ĉi UK. Kvankam ili estas ankoraŭ komencantoj, ili kuraĝe faras simplajn demandojn kaj respondas demandojn de aliaj partoprenantoj per nia lingvo. Iliaj belaj tibetaj vestoj interesas multajn esperantistojn. La sci-vol-emaj esperantistoj demandis pri Tibeto,

tibeta kulturo, tibeta nomo, ktp., kaj fotos kune kun ili. Raportis **Zheng Bocheng** KN 421

Kio Okazos

Nitobe-Simpozio - Konkluda Sesio

Pro la esprimotaj intereso de la partoprenantoj, la konkluda sesio de Nitobe-Simpozio havas lokon ĉe la salono *Chen Yi*, 16:30-18:00, 27 julio. Ĉiuj estas bonvenaj.

Kunveno de ELF-AREK

Vendredon la 30an de julio, je la horo 15a ĉiuj ELF-AREK-membroj, ĉiuj filatelistoj kaj kiuj interesiĝas ĝenerale pri ESPERANTAĴOJ estas varme invitataj kunveni antaŭ la Kafejo de la Kongresejo. Simpatiantoj kaj scivolemuloj estas same bonvenaj. Prezidos la renkontiĝon la vic-prezidanto de ELF-AREK, s-ino **Elda Doerfler** el Italio, KN 613.

ILEI-Fakkunveno Ĵaŭdon 12:15-13:15

Instruistoj/Instruantoj, por helpi plibonigon kaj plifortigon de la grava fakasocio, venu kun ideoj kaj demandoj por ILEI. KN 249

Saniĝo per Spiritaj Fortoj: Bruno Gröning

La prelego pri saniĝo per spiritaj fortoj laŭ la instruo de Bruno Gröning ne estas nur por aŭskulti, sed ankaŭ por propra sperto. Oni klarigas la akceptadon de la saniga forto, kion ĉiuj povas tuj mem praktiki, krome raportos rspaniĝintoj. La prelego estos mardon 15:15 en *Wensing* kun ripeto ĵaŭdon 13:15 en *Chen Yi* kaj vendredon 13:45 en *Chun-Chan Yeh*.

Deflet Meier KN 878

Tajĝiĉuan-kurso funkciigas ĉiu-matene je la 6:30 ĝis la 7:20 antaŭ la domo de la kongresejo. Bonvolu ĉe-esti!

Aŭtoraj Duonhoraj, mardon ĉe la *Libroservo* 11:30 Amri Wandel prezentos siajn popularsciencajn verkojn, infanlibrojn kaj kompaktan disketon de israelaj kantoj en Esperanto 16:30. Geraldo Maltos, prezidanto de la Akademio, lingvisto kaj poeto, prezentos sian novan libron pri la Esperanto-participoj kaj aliajn verkojn.

Budhisma kunveno de Budhana Ligo Esperantista okazos ĵaŭde je 13:45 en salono *Ĵelezo*. Por eble la unua fojo, BLE povas kunveni en lando kun preskaŭ dumiljara budhisma tradicio, kie ĝi estis tradicie la religio de la popolo, kontraste al la konfuceismo de la superaj klasoj. Ĉiu interesatoj estas kore bonvenaj! **Gunnar Gällmo**, KN 216, gllm-s

Laŭdo

Nacia Vespero

Mi terure ŝatis la Nacian Vesperon dimanĉe vespere.

La akrobatoj, la dancoj, la kantoj, la magio estis ĉiuj ege altkvalitaj. Sendube tio estis mia plej memorinda nacia vespero kion mi spertis dum miaj 5 universalaj kongresoj.

Sandor Horvath KN 0246



Magia ludo en la Nacia Vespero, dimanĉe 25an de julio.

Fotoj por ĉi-tiu numero faritaj de **Zhao Xi** KN 1058

Ĉu vi partoprenis aŭ eĉ organizis interesan kongresan aranĝon?

Kial ne raporti pri ĝi en la *Kongresa Kuriero* aŭ en la revuo *Esperanto*?



Lukto dum Nokto en Hoteleto ĉe Voj-kruciĝo, Beijing Opero en Nacia Vespero

Taj i an kaj Taj i-kulturo

Zhang Jiping KN:0317

1. Kio estas Taj i-kulturo?

Se temas pri ia kulturo, oni antaŭ ĉio devas pripensi pri ĝia filozofia radiko. La ĉina antikva filozofio regadis la ĉinan kulturon kelkmil jarojn. Kaj en la ĉina antikva filozofio, la trunko estas Taj i-teorio. Taj i-teorio povas esti simple klarigata en du punktojn: pri la vero kaj pri la metodo.

Unue, Taj i-teorio donis al ni la veron, t.e. **Dao**. Oni uzis ankaŭ alian vorton **Ĉi** anstataŭ **Dao**. **Dao** estas materia ekzisto ekzistanta en ĉiuj aferoj kaj estaĵoj, ĝi estas objektiva, neevitebla, neŝanĝebla per la homa povo. Sed ĝi povas esti trovebla, konata kaj utiligebla. Tiel Taj i-teorio plue montris ke la plej alta tasko por la homaro estas: "la unuiĝo de la ĉielo kaj la homo". La ĉielo ĉi tie signifas **Dao**. La homara agado devas harmonii kun **Dao**, ĉar Taj i-teorio prenis la homon kiel centron de la movado de la mondo. La homo estas la plej valora en la mondo kaj la homo estas kreo-dona. Por harmonii kun **Dao** la homaro devas senese praktiki, ili devas trovi la veron, la internan esencon de la estaĵoj, de la aferoj ktp.

Aliflanke, Taj i-teorio donis al ni la medoton, t.e. **Yin-Yang** dialektiko, per kiu ĉiuj klarigis la naskiĝon, la ŝanĝon kaj la evoluon. Pli ol 3500 jarojn antaŭe, la **Yin-Yang** dialektiko jam estis uzata vaste en la ĉina socio. En Song-dinastio, naskiĝis la Taj i-diagramo. Taj i-diagramo precize kaj figure esprimis la ideon de **Yin-Yang** dialektiko, tial ĝi estis uzata de tiamaj filozofoj. Kaj finfine ĝi fariĝis simbola bildo de la ĉina tradicia kulturo.

2. Kiel Taj i an karakterizas sin en Taj i-teorio?

En la lastaj jaroj de Ming-dinastio Taj i an naskiĝis, ĝi estis la plej elstara el internaj skoloj. Taj i an estis kreita tute sub Taj i-teorio. Unuflanke, pere de Taj i-teorio ni povas scii pri la celo de Taj i an-ekzercado: Unuiĝo de la ĉielo kaj la Homo, alivorte Taj i-stato. En Taj i-stato la ekzercanto restas en tuta trankviliĝo, li aŭ ŝi sentas sin ke la korpo disfandiĝas en la aeron, nur la konscio fluas kiel akvo. Aliflanke, Taj i an estas de movoj en **Yin-Yang** dialektiko. Kiam vi staras, antaŭ la komenco vi estas en la stato Haoso, kaj la komenca teniĝo estas en Taj i, nome aperas unuo. Poste ĉiuj movoj estas en **Yin-Yang** ŝanĝoj. Kaj la fina teniĝo revenas al Taj i, kaj la konscio revenas al la ventro. Kiam vi fine retiras la piedon, vi ree estas en la stato Haoso.

3. Kiujn utilojn Taj i an povas donaci al ni?

La unua utilo estas Taj i-stato. En Taj i-stato Taj i an efike influas vian fiziologian funkcion, jen kial Taj i an estas utila por nia sano. La dua utilo estas Taj i-maniero. Kiam Taj i an-ekzercado finiĝas, Taj i-maniero ankoraŭ funkcias for vi, ĝi povas nutri vin por via tuta vivo. Dank' al Taj i-maniero, vi fariĝas pli saĝa kaj pli energia, vi kondukas pli oportuna kaj pli scienca, kaj vi havigos al vi pli da amikoj, pli da bonaj ideoj, kaj pli da dolĉaj dormoj. La tria utilo.

Mi forflugas el Pekino nur la 7-an de aŭgusto. Mi havas nenion por fari inter la 01-07.08. Mi danke akceptus proponojn por tempopasigo kaj loĝado en Pekino aŭ en ties proksimeco. Mi estas profesia E-instruisto kaj povus instrui Esperanton 1-3 horojn ĉiutage. **Irina Gonĉarova**, Rusio KN 0781

Ĉu vi plendas, legantoj?

Eble vi plendas, ke multaj salutoj al nia UK kaj paroladoj dum la malfermo ankoraŭ ne aperis sur nia ĉiutaga ĵurnaleto (*Kuriero*). Ĉu? Ni petas vian pardonon! Mi havas tro multe por aperi sur ĝi. Atendu momenton! Ni aperigos ilin merkrede kiam vi estos pli libera. **Redaktantoj**



Arbareto "Esperanto-bosko" Naskiĝis

Matene mardon, la 27-an de julio, en Chaoyang(ĉaŭjang)-parko de Pekino okazis malfermo la ŝtono por la arbareto "Esperanto-bosko". Venis 100 esperantistoj el pli ol 50 landoj. Ĝin prezidis s-ino Tan Xiuzhu, estrino de Ĉina Esperanto-Ligo kaj estroj de la pekina registaro.

La arbareto estos porĉiama memorigaĵo de la 89-a kongreso.

La ŝtono surhavas la vorton "Esperanto-bosko" en Esperanto kaj la ĉina lingvo sur la antaŭa flanko, dum sur la dorso, mallonga teksto pri historio de Esperanto kaj la dato de la 89-a UK.

Zhou Mingwei, Chen Haosu, Zhang Heping kaj aliaj gvidantoj de ĉinaj registaraj organizoj, kaj UEA-vicprezidanto Humphrey Tonkin varme paroladis. Oni deziris, ke la arbareto "Esperanto-bosko" estu prosperu kiel la verda lingvo Esperanto. **Nia raportisto**

Nova estraro de UEA

La nova estraro de UEA havis sian unuan kunsidon, kaj disdividis la taskojn:

Renato Corsetti (Italio): prezidanto, planado, eksteraj rilatoj, informado

Claude Nourmont (Luksemburgio): vicprezidanto, kulturo, kongresoj

Ulla Luin (Svedio): ĝenerala sekretario

Ans Bakker-ten Hagen (Nederlando): financoj, administrado, TEJO

Yu Tao (Ĉinio): Azia agado, amikoj de Esperanto

Maritza Gutierrez Gonzales (Kubo): landa agado

Amri Wandel (Israelo): faka kaj scienca agadoj

La majoritato de la estraranoj estas virinoj: Claude Nourmont, Ulla Luin, Ans Bakker-ten Hagen, Maritza Gutierrez Gonzales.

La majoritato de la estraranoj estas novaj estraranoj, kaj ili estas elektitaj por periodo ĝis la kongreso en la jaro 2007.

En sia unua kunsido, la estraro decidis ke Jukka Pietiläinen (Finnlando) estos nova komisiito pri informado.

Kio Okazis

KLERIGA LUNDO

Kadre de tiu sendube utilega programero grupo de 40 kongresanoj debatis la temon KIEL ALIRI POLITIKISTOJN.

Post prezento de sukcesaj raportoj pri politika agado en Francio kaj Italio, intervenis eksa senatano de Brazilo, advokato Ulisses Riedel de Resende, montrante per funkcia ekzemplo, ke nek de sube nek de malsupre ni atingos nian "celon". Li proponis la "vojon de la mezo" per konstantaj elsendoj en televidprogramoj de komunumaj kanaloj, kiuj ĝenerale proponas alternativajn programojn al komerca televido. De du jaroj en Brazilo en pli ol 20 urboj sisteme aperas programoj pri "Esperanto kiel instrumento por solidara tutmondiĝo" per intervjuoj de elstaraj esperantistoj, kurso, debatoj pri paco, ĉio en la kadro de Neregistara Organizo nomata PLANEDA UNIO.

Subkomitato 5 pri kulturo kaj utiligo de Esperanto Kunsidis la 27an de Julio 2004 en salono Chun-Chan Yeh de 10 ĝis 11:30.

Partoprenis 25 kongresanoj. Prezidis Spomenka Ŝtimec.

Post vigla diskuto en kiu oni superrigardis la ĝisnunan aplikon de la uzo de Esperanto en ekz. plastika arto (ZEOj), turneigo de muzikistoj - esperantistoj, kaj ĝis nun nesukcesa agado por kreo de filmo pri ekz.

Zamenhof fare de famaj filmreĝisoroj okupiĝantaj ekz. pri judaj temoj, la interparoloj fokusigis al literaturo.

Hodiaŭa Vetero: nube, pluvo posttagmeze;
28°C

Oni konkludis per jenaj

Rekomendoj cele al pli forta utiligo de Esperanto

1. Krei UEA-premion por kultura evento de la jaro, kiu stimulu aplikon de Esperanto sur kultura kampo
2. Krei liston de tradukistoj el Esperanto (eventuale ankaŭ ĉe la TTTejo de EVA). Iniciati kutimon de eldonejoj provizi la tradukistojn per la nove aperintaj verkoj por rapidigi la informfluan
3. Krei liston de la plej tradukendaj verkoj el Esperanto nacilingven por helpi al tradukemuloj: Ekz. "Zamenhof-Strato", "Vualo de l' silento", "La ŝtona urbo" k.s.
4. En la revuo *Esperanto* publikigi serion da portretoj de tradukistoj el Esperanto nacilingven por diskonigi kiuj laboras pri Esperanto-lingvoponto
5. En Biblioteko Hodler krei kolekton da nacilingvaj manuskriptoj el Esperanto kiuj atendas publikiĝon, por savi la laboron faritan
6. Pri kandidato por Nobelpremio William Auld, starigi en Libroservoj specialan tablon kun nur liaj libroj kun okulfrapa informo pri kandidatigo por helpi informi pri la Nobelpremia kandidato el Esperantujo.
7. Plifortigi la laboron ĉe eŭropaj instancoj pri Esperanto kiel lingvoponto utiligante interalie la novelektitajn parlamentanojn
8. Oftigi la prelegvojaĝojn por pliintensigi rektajn informfluojn
9. Kutimigi verkantojn al pli ofta provizo de verkoj per glosoj por eviti elitisman publikon kaj faciligi al la legantoj la aliron al la verkoj.
10. Persiste observi la regulon ke neparenca-lingvano, fake kaj lingve sperta, kontrolu la lingvouzon antaŭ ol la libro aperu.

Protokolis S. Ŝtimec



Internacia koruso

La ĉeestintojn infektis la projekto "Ĝemelaj Urboj"

La unuan kunvenon de UEA pri la projekto "Ĝemelaj Urboj" okazintan en la 27-an de julio ĉeestis pli ol 30 kongresanoj el Ĉinio, Francio, Germanio, Italio, Japanio, Koreio, Nederlando, Singapuro, Usono kaj Vjetnamio. S-ino Michela Lipari, eks-estrarano de UEA pri landa agado, unue faris varman paroladon, en kiu ŝi koncize resumis la naskiĝon kaj evoluon de la projekto en la pasinteco, la komisiito legis jaran raporton por 2003, esperantistoj el Ĉinio, Japanio kaj Vjetnamio rakontis sian sperton en tiu kampo. Ankaŭ de s-ro HORI Yasuo, prezidanto de KAEM, oni aŭdis la voĉon, kiu forte subtenis la projekton. Bedaŭrinde multaj samideanoj pro la lima tempo difinita ne povis doni siajn proponojn aŭ ideojn al la projekto spite al tio, ke ili treege volis. Indas menci, ke s-ino Tan Xiuzhu, prezidanto de ĈEL, restis iom da tempo en la kunveno, kvankam ŝi estis tre okupita. En la kunveno la komisiito tre ĝojis pro tio, ke li ricevis donacaĵojn de s-ro Pieter Engwirda el Nederlando kaj s-ro Han Daozhu el Ĉinio, kaj de Vjetnamia Esperanto-Asocio kiuj sufiĉe esprimis varman subtenon al la projekto "Ĝemelaj Urboj".

Antaŭ la kunveno ĉiu ĉeestinto akiris n-ron. 2 *Verda Ŝtelo*, trimonatan organon de LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio), kun belaj kovriloj, en kiu aperis n-ro 2(9). Informilo de Ĝemelaj Urboj, reta revueto de UEA pri la projekto. Post finiĝo de la kunveno la komisiito trovis, helpe de s-ro Liu Zhengkun, prezidanto de LEA, s-inon Guo Shaomei, esperantistinon en la urbo Xiamen, Ĉinio. Tio realigis la deziron de iu esperantisto el Nov-Zelando, en kiu li longe serĉis samideano(j)n en la ĉina ĝemelurbo de sia loĝurbo. La nesufiĉa tempo baris la komisiiton "aŭdi" pli multe da propono al la projekto, sed li kore esperas, ke post ĉi tiu UK li povos ricevi ilin pere de letero (la adreso de KN 0473) kaj retadreso (amikeco999@21cn.com).

La prakonatojn ĉu ni lasu velki el memor'?
Ĉu ni ne pensu kare pri iamo longe for?

Kuniĝo de Ĉi-foja Kongresanoj Kiuj Partoprenis de 71-a UK en 1986, 13:00-13:30 ĵaŭde, 29an de julio, Halo 15, nivelo 3.

Tajĝiĉuan varme aplaŭdita

26-an en la salono *Lapenna* la prelego "Tajĝiĉuan kaj Tajĝi-kulturo", donita de ĉina esperantisto s-ro Zhang Jiping (KN: 0317), estis varme aplaŭdita. La salono estis plen-plena je pli ol 100 personoj. La prelego iris ne nur kun komputila projekciado sed ankaŭ kun realaj prezentadoj de s-ro Zhang. Post la prelego ĉiuj aŭskultantoj lernis bazajn movojn de Tajĝiĉuan sub la instruado de s-ro Zhang. Se vi interesiĝas pri Tajĝiĉuan kaj Tajĝi-kulturo, bonvole kontaktigu kun s-ro Zhang Jiping laŭ jena ret-adr.: taiji1248@yahoo.com.cn. **Liu Pengzhong**

Natur-kuracado (mardon, la 27an de julio, 2004, 13:00-14:30 en *Lapenna*)

Okazis la fak-kunsido de Internacia Naturkuraca Asocio (I.N.A) kun la partopreno de ĉirkaŭ 80 kongresanoj. Wang Xigen (Ĉinio), vicprezidanto de INA salutis kaj prezentis estraranojn de INA, kaj Puramo CHONG (Koreio), prezidanto, prezentis skizan historion kun movadaj aspektoj por diskonigo al la partoprenantoj pri la organizo.

Sekvis faka prelego de Harald Schicke (Germanio) kun la temo "La Spenglersan-koloidoj" kun lumbilda prezento pri diversaj ekzemploj de kuracefikoj de la koloido. Pri la delatoj de la prelego oni ankaŭ povas legi en INA-revuo, kiun INA eldonis speciale per granda formato por la Pekina kongreso.

La partoprenantoj aŭdis ankaŭ alian prelegon de Puramo CHONG pri "Duonkorpa banado", unu el la hidroterapioj laŭ la naturkuracado. La partoprenantoj montris grandan intereson pri la nova ban-maniero, kiu estas facile praktikebla en ĉiutaga vivo, kaj havas multajn kuracefikojn. Sekvis multaj utilaj demandoj kaj respondoj por tuj praktiki la manieron.

Petro Chrdle (Ĉeĥio) prezentis la libron de Puramo CHONG, "Kompleksia medicino kaj Saam Akupunkturo", kaj Dieter Meiyer (Germanio) prezentis la movadon de Amikaro Gröning kaj proponis partoprenon en sia fak-kun-sido.



Ĉina Eksprese

Libroservo

Fotoj: Zhao Xi, KN 1058

Fervojista kunveno.

Dimanĉe posttagmeze okazis la tradicia fervojista kontaktkunveno en la salono Chen Yi. Partoprenis 53 kongresanoj el 14 landoj. La kunvenon gvidis ing. Istvan Gulyás, vicprezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF). Li raportis pri la pasinta IFEFF-kongreso, okazinta en la urbo Sopron (Hungario). Tiun ĉi kongreson komune aranĝis la hungaraj kaj aŭstraj fervojistaj esperantistoj. Poste li mallonge parolis pri la historio de IFEFF, kaj pri la venontaj IFEFF kongresoj. La ĉeestantoj vigle interesiĝis pri la 58-a IFEFF-kongreso, okazonta en Ŝanhajo (Ĉinio) en 2006. La organizantoj promesis prilabori planon pri la vojaĝeblecoj precipe el Eŭropo al Ĉinio per trajnoj aŭ aviadiloj. S-ro Li Sen kaj Han Zuwu, estroj de la Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio deziras pretigi tre allogajn programojn por la eŭropaj gekolegoj. Ili disdonis librojn, kies temoj estas la evoluo de la fervojo en Ĉinio. Krome ili transdonis artajn objektojn donace al la vicprezidanto de IFEFF. La ĉeestantoj konstatis, ke la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino donas impulson al la fervojista Esperanto-movado en Ĉinio.

Dum la kunveno Sylviane Lafargue, franca fervojistino, laŭtlegis la alvokon de la aviadila sindikata organizaĵo por enkonduki Esperanton en la aviadilan trafikon apud la angla.

Bone funkcias la kunlaboro kun la medicinistoj (UMEA), pri kiu d-ro Imre Ferenczy la prezidanto de UMEA donis detalan klarigon.

Fine sekvis informo pri la sekvontjara IFEFF-kongreso okazonta en la urbo Brasov (Rumanio).

István Gulyás KN 607

Kunsido de Rondo Kato

Rondo kato (Esperantista Kat-amikaro) kunigis 26 katemajn geesperantistojn, kiuj diskutis pri la temo "Kial ni ŝatas katojn?". Post 45-minuta vigla interparolo kaj pluraj anekdotoj ili konkludis: "Katoj allogas nin ĉar ili estas sendependemaj, dignaj, misteraj kaj senimpostaj." Tiu ĉi lasta eco, senimposteco, estis nur ŝerce aldonita, sed ĝi efektive respegulas fakton. Nome en multaj lokoj, kiel en ekzemple ĉinaj urboj, posedantoj devas pagi impostojn por teni hundon, sed ne por katojn.



Fine la gvidinto de la kunsido, Francisco L. Veuthey (kn 120), invitis la ĉeestantojn promenetri tra la halo de sia etaĝo admirante la belajn murpentraĵojn, kiuj havas kiel ĉeftemon katon. Ĉu tio estis feliĉa hazardo aŭ planita ago de la kongresaj organizantoj? Miaŭajn dankojn, ĉiuokaze! **Raportis F. L. Veuthey**

Kio Okazos

FAKAJ ASOCIOJ SIN PREZENTOS

Ĵaŭdon la 29an de julio en la akceptejo (unu inter la ĝiĉetoj uzitaj por preni kongresajn dokumentojn)

Fakaj asocioj prezentos sian agadon de la 10a ĝis la 18a horo laŭ jena deĵor-listo:

10:00-12:00 IFEF

12:00-14:00 IKUE/KELI

14:00-16:00 ATEO

16:00-18:00 AVE/TEVA

Uzu la eblecon kaj ekkonu la agadon de fakaj asocioj.

Marija Beloŝević, UEA-komisiito pri FA

Letero

Karaj Esperantaj amikoj, kiuj vizitas aŭ ne la RPL (Retejojn Pri Lingvoj - <http://ssi.cmnw.net>),

Mi ne scias, ĉu vi memoras, ke hodiaŭ, en la kristana gregoria kalendaro, estas la 26-a de julio 2004. Mi ne scias, ĉu vi memoras, ke precize antaŭ 117 jaroj, io tre revolucia okazis en la historio de la homaro: la 26-an de julio 1887, polo Olazaro Ludoviko Zamenhof sukcesis la unuan eldonon de sia libro, per kiu li prezentis projekton por internacia lingvo, kies nomo poste estos ESPERANTO (oni devas memori, ke Zamenhof ne uzis sian nomon en la libro, sed subskribis kiel D-RO ESPERANTO -- "tiu, kiu esperas"). En la 8-a Universala Kongreso, okazigita en Krakovo, Pollando, 1912, li diris: "Antaŭ 25 jaroj, mi timeme demandadis al mi, ĉu post 25 jaroj iu en la mondo ankoraŭ sciis, ke iam ekzistis Esperanto kaj -- se Esperanto vivus -- ĉu oni ankoraŭ povus kompreni ion skribitan en Esperanto en ĝia 1-a jaro, kaj ĉu angla esperantisto povus kompreni hispanan esperantiston. Pri ĉi tio la historio jam donis plenan kaj trankviligan respondon". Jes, karaj amikoj, hodiaŭ Zamenhof havas multajn kialojn por trankviliĝi: eĉ post la apero de interreto, io kreata de anglalingvanoj, Esperanto travivis!

Pro tio, ke mi povas komunikiĝi kun vi, gehomoj de la tuta mondo, per neŭtrala kaj facila lingvo, mi devas festigi ĉi tiun daton! Hodiaŭ la justa amaskomunikado estas realaĵo, sed la potenculoj ne gravigas tion: li preferas gajni pli da mono por si ol vidi pli bonhomecan mondon, senmizeran, senmalriĉecan, senmilitan... sen la problemoj de la lingvaj baroj! Ili ne toleras vidi la avantaĝojn de la uzo de neŭtrala lingvo por plej bona mondo, ĉar al ili ne gravas, ĉu la cetera mondo estas bona aŭ malbona. Sed al NI, geesperantistoj, tio gravegas; tial, ni restas uzantaj la neŭtralan lingvon por amikumi, interŝanĝi ideojn, koni novajn kulturojn, gehomojn kaj religiojn ktp.

Zamenhof donis grandan donacon al la homaro; ion, kio estas nenies, sed ĈIES samtempe. VI, kiu parolas Esperanton, estas unu el la bon-sortuloj, kiuj akceptis ĉi tiun donacon! Movita de la "interna ideo", vi havas ilon por ŝanĝi la nuntempan mondan scenejon, ĉu en diplomatio, ĉu en la ekonomio, ĉu en la turismo, ĉu en la politiko, ĉu en la internaciaj decidoj, kaj aliaj fakoj, kie Esperanto povas esti tute utila. Paroli Esperanton estas kompreni la mondon, kaj kompreni la mondon estas fundamenta kondiĉo, por ke oni povu ŝanĝi ĝin. Kredu, ke vi povas fari tion, neniam laciĝu:

KREDU! Nia mondo jam estis bonŝanĝita multfoje, kaj alia ega ŝanĝo ne devas esti malfacila! LUKTU per pacaj armiloj, ĉar la mondo ne toleras plu la fajrajn armilojn! PRUVU, ke vi estas eta, sed estas parto de la mondo! ESPERU ĉiam, ĉar via klopodo ne estos vana.

Ĉar preskaŭ antaŭ 100 jaroj, iu simpla polo diris: "La diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin je malamikaj partoj".

Rim. Ĉi tiu estas omaĝo de Erick Fiszuk (Erik Fišuk) el Brazilo kaj RPL al ĉiuj esperantistoj de la mondo, pro la 117-a datreveno de la apero de la 1-a Esperanta libro kaj, konsekvence, la ESPERANTO-TAGO. Gratulon al ĉiuj!

Aŭtora Duonhoru (6) 11:30-12:00, 29 julio

Verkoj de Elpin

Elpin (Koreo) estas pli fame konata en Ĉinio kiel verkisto. Pli ol 40 verkoj de li, tradukaĵo de ĉinaj originaloj, estas unua-foje kolektitaj de CHOE Daesuk, kiu prezentos la libron.

Rubriko Esperanto

Kolekto de 45 artikoloj

La Donga Ilbo, korea tagĵurnalo, publikigis, antaŭ 80 jaroj, Esperanto-artikolojn en sia *Rubriko Esperanto*. La tuta kolekto de 45 artikoloj aperintaj en la semajna rubriko estas libroforme eldonita de Korea Esperanto-Asocio. LEE Chong Yeong prezentos.

Ĉu vi havas sugestojn pri la eksteraj rilatoj? Venu al Subkomitato 2 (Eksteraj Rilatoj), 13:30-14:45, 29a julio en Chun-chan Yeh.

Eksteraj rilatoj estas grava parto de la agado de UEA, sed la planita kunsido de la Subkomitato 2 ne sukcesis. Estas multaj problemoj diskutotaj.

Pro tio la kunsido de la Subkomitato 2 (Eksteraj Rilatoj) estas ree planata je 13:30-14:45, la 29an de julio en la salono *Chun-chan Yeh* (halo 12, la 3-a etaĝo).

Ĉiuj kiujn interesas eksteraj rilatoj, estas bonvenaj. La rezulto de la kunsido estas prezentota ĉe la Komitata Kunsido en vendredo.

Cu Vi Scias?

Nia kongresejo estas Internacia Konferenca Centro. Kiam la LKK parolis kun la estroj de la centro, oni fiere diris al ni, ke interpretistoj en la centro parolas 16 lingvojn. LKK-anoj respondis: "Nia internacia kunveno ne bezonas interpretiston." (interpreti – parole ali-lingvigi)



Parolado de Xu Jialu, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, en la malfermo de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto (Matene 25-an de julio)

Estimata prezidanto,
Karaj gekongresanoj,
Bonan matenon!

En la varmega julio la 89-a Universala Kongreso de Esperanto solene inaŭguriĝis en Pekino. Mi varme gratulas vin.

Mi estas ĝoja kunesti kun du mil esperantistoj el dekoj da landoj por vidi, kiel la kongresanoj kun malsamaj kulturaj tradicioj de malsamaj nacioj senpere kaj intime interkomunikiĝas pere de la internacia lingvo Esperanto, sed bedaŭinde, escepte de mi.

Mi estas ĝoja ankaŭ pro tio, ke mi refoje renkontiĝis kun kelkaj malnovaj amikoj. En 2001 mi konatiĝis en Pekino kun d-ro Renato Corsetti, prezidanto de UEA, kaj prof. Lee Chong-Yeong, ĝia vicprezidanto. Tiam ni interparolis pri la ebleco akceli la Esperanto-movadon ĉinan kaj tutmondan pere de gastigo de universala kongreso en Pekino. Hodiaŭ nia deziro realiĝis. Mi kore dankas UEA kaj diverslandajn esperantistojn pro ilia varma subteno al la Pekina Kongreso kaj la ĉina Esperanto-movado.

Nia kongresa temo estas "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj". Tio estas bona kaj grava temo. En la nuna mondo estas diversaj neegalecoj: ekonomia, kultura kaj politika, dum la lingva neegaleco koncentre spegulas la nacian neegalecon. Kiel la plej grava portanto de kulturo kaj kiel speciala kaj grava formo de nacia kulturo, lingvo ludas neanstataŭigeblan rolon en heredado kaj interŝanĝo de la naciaj kulturaj tradicioj, en la ekonomia kaj socia disvolviĝo de diversaj lokoj. La lingva neegaleco certe plirapidigos flankiĝon de iuj nacioj. Nun, kiam multaj malproksimvidaj personoj pledas por intensigi kulturen interŝanĝon de diversaj nacioj, energia disvolvo de Esperanto estas necesa por realigi lingvan egalecon en la nova jarcento.

Jam forpasis 117 jaroj de tiam, kiam naskiĝis Esperanto. En tiu periodo, Esperanto, kiel lingvo neŭtrala kaj pli kaj pli perfektiganta, jam faris sian apartan kontribuon al la paco, amikeco kaj interkompreno de la homaro. Nun esperantistoj de la tuta mondo daŭre penadas por lingva egaleco, paco kaj prospero de la morgaŭa mondo. Tio estas vere laŭdinda.

La ĉina registaro ĉiam subtenas Esperanto-movadon. En 1986 en Pekino okazis la 71-a UK. Post 18 jaroj Ĉinio refoje bonvenigis diverslandajn geamikojn. En la pasintaj 18 jaroj la ĉinaj socio, ekonomio, kulturo kaj aliaj rapide disvolviĝis kaj ankaŭ la ĉina Esperanto-movado senĉese progresis. Ĉion ĉi vi povas sperti dum la kongresaj tagoj kaj postkongresaj ekskursoj.

Sendube, vi trovos ankaŭ, ke estas multaj aferoj ne ŝanĝiĝis en Ĉinio. La Granda Muro staras same impone kiel antaŭe. La pekinaj stratetoj *hutong* de la antikvaj kvartaloj restas samaj kiel antaŭe, kaj pli grave, la 5000-jara kulturo de Ĉinio vidiĝas ĉie tra la tuta lando. Kaj la ĉina popolo restas paca, amika kaj gastama kiel antaŭe. Nun estas plej varme en Pekino. Mi kredas, ke vi jam spertis tion. Mi petas vin preni la varmecon de la vetero kiel amikecon de la ĉina popolo al alilandaj gastoj. Akceptu kaj spertu ĝin, kvankam vi ankoraŭ ne povas alkitimiĝi al ĝi.

Esperanto, kiel lingvo, estas tre utila instrumento por ni ĉiuj, dum UK donas al ni bonan ŝancon por koni aliajn landojn, aliajn homgrupojn kaj aliajn naciojn. En la pasintaj jaroj UK okazis sinsekve en Germanio, Israelo, Kroatio, Brazilo kaj Svedio. Mi kredas, ke vi jam havas certan konon pri la tieaj kulturo kaj popolo. La nuna kongreso estos utila al vi por koni kaj kompreni nian landon kaj popolon. Post la kongreso vi povas fieri diri: "Mi jam konatiĝis kun la lando, kies loĝantoj konsistigas kvinonon de tiuj de la mondo."

Interkompreno estas bazo de amikeco kaj paco. Se ĉiuj popoloj

bone komprenas unu alian, do la mondo estos pli bela. Surbaze de interkompreno ni povas vivi pace por kune konstrui la pli belan mondon. Ĉi tie mi volas citi versojn de L. L. Zamenhof en lia poemo "La Espero". Mi scias ke vi bone konas ĝin. Kun muziko nun ĝi jam fariĝis himno de la Esperantujo:

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.*

Fine mi deziras grandajn sukcesojn al la 89-a UK. Sanon kaj agrablan restadon en Ĉinio al vi ĉiuj. Dankon!

Salutvortoj de la urbestro de Pekino

Al la 89-a UK (25-an de julio 2004)

Estimata vicprezidanto de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso Xu Jialu,
Estimata UEA-prezidanto s-ro Renato Corsetti,
Estimataj gekongresanoj,
Karaj gesinjoroj kaj geamikoj,

Hodiaŭ la 89-a Universala Kongreso de Esperanto solene inaŭguriĝis ĉi tie. Ni ege ĝojas pro nia refoja gastigo de la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino post 18 jaroj. Unue, permesu al mi, en la nomo de la pekina registaro kaj 13 milionoj da gastamaj pekinanoj, esprimi varmajn salutojn kaj bonvenon al vi ĉiuj, estraranoj kaj komitatanoj de UEA kaj ĉiuj kongresanoj el diversaj landoj, kaj peti vin transdiri nian sinceran saluton al ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo!

Pekino kun historio de pli ol 3 mil jaroj funkciis kiel ĉefurbo de Ĉinio jam 850 jaroj. Ĝi estas ne nur fama antikva urbo, sed ankaŭ internacia metropolo moderna kaj malferma. La ĉina kulturo kaj longa historio brilas en Pekino pro la Granda Muro, Imperiestra Palaco, Somera Palaco, Ĉiela Altaro kaj aliaj historiaj restaĵoj. Kaj la Olimpikoj en 2008 faros Pekinon urbo pli moderna. En tiu urbo, kiel la antikveco kaj moderneco harmonie kunfandiĝas, novan disvolviĝon havas Esperanto, strebanta al lingva egaleco, paco, amikeco kaj progreso.

En la 21-a jarcento ni alfrontas plurismon de la mondo, ekonomian tutmondiĝon kaj sciencan kaj teknologian informadon. Ĉinio deziras antaŭen marŝi kune kun la mondo en paco kaj progreso. Nia kongresa temo "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj" parte montras la atenton kaj pripenson de homoj pri la problemo de la lingva egaleco en la internacia komunikado en la nuna situacio kaj senlaca klopodado de esperantistoj al la mondopaco.

Hodiaŭ esperantistoj el malsamaj kontinentoj kolektiĝas en nia antikva urbo ĉe la Granda Muro, ebligante al ni refoje sperti la fortan vivipovon kaj noblan idealon de Esperanto. Mi kore esperas, ke vi ĉiuj, estimataj amikoj, persone spertos kaj ĝuos la historian ĉarmon kaj modernan aspekton de Pekino, pli profunde konos la ĉinan popolon kaj havos la belan kaj neforgeseblan kongresan semajnon!

Grandan sukceson al la 89-a UK!

Longe vivu la amikeco inter esperantistoj de la tuta mondo!

Koran dankon.

Salutvortoj de la urbestro de Pekino en la urbestra akcepto por la 89-a UK

25-an de julio 2004

Estimataj estraranoj de UEA,
Estimataj gekongresanoj,
Karaj gesinjoroj kaj geamikoj,

Hodiaŭ matene inaŭguriĝis la 89-a Universala Kongreso de Esperanto. Amikoj el diversaj landoj kaj regionoj de la mondo gaje renkontiĝis en varma atmosfero. Bona komenco estas duono de la sukceso, tio aludas plenan sukceson de la kongreso.

En la pasintaj 18 jaroj Pekino dufoje fariĝis gastiganto de UK. En la nomo de la pekina registaro kaj 14 milionoj da pekinanoj, mi dankas vin ĉiujn, estimatajn estraranojn de UEA kaj diverslandajn esperantistojn, pro viaj konfido kaj subteno. Mi esperas, ke vi havos, dum la kongresa semajno, pli da ŝancoj por koni Pekinon, ĝui ĝiajn historiajn restaĵojn kaj vidindejojn, sperti la vivon de ĝiaj urbanoj, amikiĝi kaj amuziĝi.

Mi proponas toston por la plena sukceso de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto kaj deziras pli grandan progreson al Esperanto-movado en la nova jarcento kaj agrablan restadon en Pekino! Koran dankon.

La prakonatojn ĉu ni lasu velki el memor'?

Ĉu ni ne pensu kare pri iamo longe for?

Kuniĝo de Ĉi-foja Kongresanoj Kiuj Partoprenis en 71-a UK en 1986, 13:00-13:30 ĵaŭde, 29an de julio, Halo 15, nivelo 3.

Herooj sur Granda Muro

Ĉinoj diras, oni ne estas heroo sen supren-iri sur la grandan muron. Hieraŭ niaj kongresanoj surgrimpis la Grandan Muron. Do ni ĉiuj estas herooj!



Sur la Granda Muro



Ĉe la Ming-Maŭzoleo



Gaja babilado

H. Tonkin parolis en malfermo de la arbareto “Esperanto-Bokso” 27an de julio, 2004

Karaj ĉinaj gastigantoj,
Karaj kongresanoj,

Tiu ĉi loko nomiĝas Esperanto-Bosko. Bosko estas iom nekutima vorto, ĝi estas ĉarma vorto. Ĝi signifas ne nur kolekton de arboj, sed efektive iun lokon, kie oni povas ripozi, kie oni povas sin kaŝi. Vi povas pensi pri du uzoj de tiu vorto en la Esperanto-literaturo. Unu estas en tradukita teksto, la tradukita kanto el la angla. Temas pri kimra (regiono en Britujo) kanto. Kaj tiu poemo traktas pri bosko-frakseno kaj frakseno estas speco de arbo. Kaj ĝi memorigas pri ripozloko, loko kie oni povis sidi kaj pensi pri si kaj pensi pri la naturo. Kaj estas alia mencio de bosko en la Esperanto-literaturo, en belega poemo de Kalocsay. Kalocsay skribas poemon pri la insulo Margareta en Budapeŝto. Sur ĝi iam estis monaĥejo. Sed poste oni konstruis tie sur la ruinoj de la monaĥejo parkon. Kaj tien la geamantoj de Budapeŝto iras. Do ĝi estas kvazaŭ, kiel la poemo diras, ĝi estas amkaŝa bosko. Mi esperas, ke laŭ la tradicio de la Esperanto-literaturo ankaŭ tiu ĉi Esperanto-bosko estos loko de ripozo. Mi esperas, ke ĝi estos loko de amo. Mi esperas, ke ĝi estos loko de memoro. Ne estas malofte, ke dum Kongreso oni dediĉas iun lokon, iun parkon, iun straton aŭ ion tian, celebre aŭ feste al tiu kongreso. En 1959 en Varsovio ni dediĉis straton je la nomo de Zamenhof. Antaŭ kelkaj jaroj en Zagrebo ni dediĉis monumenton. Sed mi povas aserti kun absoluta certeco, ke neniam ni dediĉis tiel belan lokon je la nomo de Esperanto. Mi volas danki al la pekina registaro pro la helpo, kiun ĝi donis por krei tiun ĉi parkon. Kaj mi volas danki al la esperantistoj de Pekino kaj de Ĉinio ĝenerale pro la ideo dediĉi boskon al Esperanto. Kaj mi diru al la ĉinaj esperantistoj, ke post kelkaj tagoj vi eniros periodon similan al tiu, ke virino kiu ĵus naskis. Vi kun plezuro festos la malaperon de via granda pezo. Sed vi ankaŭ iomete deprimiĝos pro tio, ke tamen la esperantistoj malaperis kaj reiris al siaj hejmoj. Do vi venu tiam al la Esperanto-bosko por memori kaj iomete tristi, malfeliĉi pri la malapero de la esperantistoj, sed ankaŭ kun granda ĝojo, ĉar ni lasas parton de nia koro ĉi tie en Pekino.

Koran dankon!

Kio Okazis

Pagodo

Marde enhavoriĉa prelego pri pagodo kun klare ĝisdataj bildoj kaj bela muziko far de Zhang Shaoji vekis grandan intereson inter ĉirkaŭ 120 ĉeestantoj. Responde al postulo pri interŝanĝo, precipe flanke de BLE kaj japanaj s-anoj, **Zhang promesas alŝuti la detalon aŭguste al sia TTT-ejo** <http://Agadu.126.com>. Vi estos bonvena tie.

Kio Okazos

FAKAJ ASOCIOJ SIN PREZENTOS

Ĵaŭdon la 29a de Julio en la akceptejo (unu inter ĝiĉetoj uzitaj por preni kongreasajn dokumentojn)

Fakaj asocioj prezentos sian agadon de la 10a ĝis la 18a horo laŭ jena deĵor-listo:

10:00-12:00 IFEF

12:00-14:00 IKUE/KELI

14:00-16:00 ATEO

16:00-18:00 AVE/TEVA

Uzu la eblecon kaj ekonu la agadon de fakaj asocioj.

Marija Beloŝeviĉ, UEA komisiito pri FA

Ĵaŭde Matene, 9:30-10:00, **IONEL Onet**, la respondeculo de la Liberservo, prezentos kelkajn el la plej freŝaj Esperantaj eldonaĵoj en la Libroservejo.

Verduloj

Publika kunsido de la Asocio de Verduloj Esperantistaj okazos Ĵaŭde, 12:30 – 14:00. Krom tio vi povas kontakti kun AVE-anoj en la Faka Ĝiĉeto je la 16a ĝis 18a. Nia temo estos “Verda politiko: Ekologio, Paco, Homaj kaj Bestaj Rajtoj”. Post konciza prezento de AVE kaj enkonduko en nia temaro ni deziras diskuti kun la ĉeestantoj. Ni esperas, ke kiel en la IJK ankaŭ en la UK ni havos viglan debaton. Ni invitas ĉiujn kiuj interesiĝas pri naturo, pacaj manieroj redukti konfliktojn kaj similaj temoj, kiujn oni nomas Verda Politiko. **Manfred Westermayer**, sekretario de AVE, KN 0091.

Infanoj Kantas kaj Dancas

La infanoj de la infanvartejo Song Qingling prezentos artajn programerojn por la 89-a UK. Ni tutkore invitas ĉiujn kongresanojn al la prezentado.

14:00 – 15:00, Ĵaŭde, la 29-an de julio

Vestiblo de la dua etaĝo (antaŭ la kafejo) de la Pekina Internacia Konferenca Centro

Aŭtoraj duonhoraj, Ĵaŭdon en la Libroservejo

11:30 **Puramo Chong** pri sia nova libro “Kompleksia Medicino kaj SAAM-akupunkturo”

16:30 **Hou Zhiping** pri “Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado”

UK 2006 en Florenco (Italujo)

La informan flugfolion vi ricevis en via dokumentujo. La ceteraj kopioj elĉerpiĝis. Se vi deziras aŭskulti mallongan prezenton (kun bildoj) pri la florenca UK, vi estas kore invitataj al la kunveno: “Venontaj UK-oj”, kiu okazos vendredon 2004-07-30, h16:30, en salono *Hodler*.

Ĉina pentrarto

Tra miloj da jaroj oni pentras per linio kaj koloro en Ĉinio kaj aliaj lokoj en la mondo. Sed ĉinaj artistoj regas la penikon en sia speciala maniero por produkti diversajn liniojn. Tio havas longan historion. En lastaj jarcentoj art-teoristoj kaj arto-historiistoj en Ĉinio multe debatas pri la tuĉo kaj inko en la tradicia ĉina pentrarto. **WEN Jingen** klarigos la evoluon de linio en ĉina arto. Aŭskultu lian opinion kaj donu vian propran! (14:45, Ĵaŭde, 29an julio, *Jezezo*)

LA FAMILIO BONVOLO – invitas vin lerni pri DVDigo de la videokurso – Esperanto, *Pasporto al la tuta mondo*. La videokurso por instrui Esperanton nun pretas por uzo en NTSC kaj PAL formato. Sed tre baldaŭ haveblas la kurso en DVD formato kun subtitoloj en Esperanto, Angla, Hispana, Germana, Itala, kaj Ĉina lingvoj. Ni akceptos aliajn linvojn ĝis 12.

B.V. venu por aŭdi pri la progreso:

vendredo, je 14:00 horo en Jezezo

Georgo – el Grekio

Filisa – el Meksikio

Jolanda – el Ĉinio

Karlo – el Britio

Helena – el Usono

– membroj de la Familio Bonvolo

Lusi Harmon KN # 162

Spiritisma Kunveno

Vendredo – Salono *Jezezo* – 15:15--16:45

Temo: Sintezo de la Spiritisma Doktrino

Fundamento pri Spiritismo

La libroj de la Pentateŭko

La Genezo



Fotoj de hodiaŭa numero: **Liu Sigong** KN 1045

Hodiaŭa Vetro: nube, pluvo;

24-26°C

LINGVA EGALECO EN INTERNACIAJ RILATOJ

Nia kongresa temo estas "Lingva Egaleco en Internaciaj Rilatoj". Ni pridiskutos tiun temon en tri kunsidoj – en dimanĉo, mardo kaj ĵaŭdo. Mi invitas vin partopreni niajn diskutojn.

La internacia lingvo Esperanto estis kreita en spirito de egaleco. Ĝiaj fondintoj argumentis, ke, se personoj el malsamaj lingvoj parolas Esperanton inter si, ili parolas en egaleco. Se mi, kiel parolanto de la angla, insistas, ke vi parolu mian lingvon, tio estas malegaleco. Se vi, kiel parolantoj ekzemple de la ĉina, insistas, ke mi parolu vian lingvon en niaj rilatoj, ankaŭ tio estas malegaleco. Esperanto proponas neŭtralan alternativon al la hegemonio de lingvoj.

Hodiaŭ, en la internaciaj rilatoj kelkaj lingvoj estas fortaj kaj kelkaj malfortaj. Lando, kies lingvo ne estas uzata internacie, devas investi grandajn sumojn por instrui fremdajn lingvojn al siaj civitanoj. Se ĝi volas vendi siajn varojn alilande, ĝi devas uzi aliajn lingvojn. Se ĝi volas krei kulturajn rilatojn aŭ sciencajn rilatojn aŭ politikajn rilatojn, ĝi devas uzi fremdajn lingvojn. Sed tiuj, kies lingvoj estas vaste uzataj eksterlande, ne devas investi tiom da mono en fremdlingva instruado, kaj ne bezonas uzi aliajn lingvojn por la sciencaj aŭ politikaj aŭ kulturaj interŝanĝoj. Se iliaj lingvoj estas parolataj internacie, ili povas allogi sciencistojn, studentojn, turistojn. Ili do gajnas grandajn avantaĝojn per la forteco de siaj lingvoj.

Ĉi tie en Ĉinio, oni investas grandegajn sumojn je la lernado de la angla, kun nur parte sukcesaj rezultoj – kaj nur por atingi la saman nivelon kiun la denaskaj parolantoj de la angla lingvo atingas kiel etaj infanoj. Kaj ju pli da ĉinoj lernas la anglan lingvon, des pli da avantaĝoj havas la denaskaj parolantoj de la angla kaj la anglalingvaj landoj.

Tiu sistemo, laŭ kiu la homoj el unu nacio estas devigataj uzi la lingvon de alia nacio por komunikiĝi internacie, estas malegaleca. Ĝi estas diskriminacia.

La parolantoj de Esperanto argumentas, ke la internacia lingvo metas ĉiujn personojn en egalan pozicion. Ĉar Esperanto estas pli facile lernebla ol multaj aliaj lingvoj, ĝi ne postulas tiel grandan investon kiel la lernado de aliaj lingvoj. Se ĉiuj homoj uzus Esperanton por la internaciaj kontaktoj, ili ĉiuj troviĝus sur sama nivelo.

Ne ĉiu estas artisto, sed ĉiu povas ĝui pentron!

WEN Jingen kore invitas vin al sia prelego

Linio en Ĉina Pentr-arto



14:45 ĵaŭdon, 29 julio Ĵelezo



Ekspozicieto de ĉinaj pentraĵoj kaj demandaro

Donacetoj por respondontoj de demandaro. Halo 16, nivelo 3, ĵaŭdon kaj vendredon

Novaj Aliĝoj

kn	Nomo	Adreso
1795	Zhang Qian	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1796	Wu Jingli	Guangdong, Guang-zhou-da-dao-nan-yi-jing-cui-yuan-cui-lin-ju-11-zuo-6-F, Ĉinio
1797	Pan Xuemeng	Shan'xi-yang-quan-shi-yang-mei-yi-zhong-chu-zhong-231-ban, Ĉinio
1798	Sun Zhixian	Beijing-chao-yang-xin-fang-cun-xin-fang-yuan-1332-hao, Ĉinio
1799	Chen Hongyu	Beijing-chao-yang-xin-fang-cun-xin-fang-yuan-1332-hao, Ĉinio
1800	Zhang Tiezheng	Suzhou-dong-gang-er-cun-38-zhuang-201-shi, Ĉinio
1801	Jia Wende	Qianghaisheng, Xi'ning-shi, Xi-guan-da-jie-60-hao, Ĉinio
1802	Jia Yan	Qianghaisheng, Xi'ning-shi, Xi-guan-da-jie-60-hao, Ĉinio
1803	Tao Xiaoqin	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1804	Wang Aiyu	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1805	Zhang Li	Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1806	Yu Zechen	Beijingshi, Chong-wen-qu-dong-hua-shi-bei-li-zhong-qu-4-hao-lou, Ĉinio
1807	Guo Qi	Beijingshi, Chong-wen-qu-dong-hua-shi-bei-li-zhong-qu-4-hao-lou, Ĉinio
1808	Guo Chao	Beijingshi, Chong-wen-qu-dong-hua-shi-bei-li-zhong-qu-4-hao-lou, Ĉinio
1809	Dai Liming	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1810	Liu Fugang	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1811	Liu Quanjia	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1812	Ma Xianghong	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1813	Yang Yang	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1814	Zhang Ting	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1815	Yue Yating	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1816	Yang Jieli	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1817	Liu Cui	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1818	Yang Yawei	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1819	Wang Na	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio

1820	Li Yan	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1821	Ling Dan	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1822	Ling Yun	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1823	Yang Lirong	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1824	Cai Yangyi	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1825	Feng Huihao	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1826	Cui Lianshu	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1827	Liu Huiran	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1828	Zhao Xu	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1829	Yang Jinghe	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1830	Wang Wanli	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1831	Wang Yi	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1832	Shen Dawei	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1833	Xin Heguang	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1834	Xie Yunlong	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1835	Li Wei	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1836	Yang Jianhua	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1837	Chen Jinwei	Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1838	Li Jiaquan	Hubeisheng, Wu-han-shi, Qing-shan-Wu-gang-gong-ye-gang-she-bei-bu, Ĉinio
1839	Li Dongfang	Beijingshi, Feng-tai-nan-yuan-hong-fang-zi-xi-hong-yuan-xiao-qu-3-dan-yuan-4-502, Ĉinio
1840	Wang Siyuan	Beijingshi, Fengtai-dong-gao-di-29-2-1, Ĉinio
1841	Chen Xiulan	Yunnansheng, Kun-ming-shi-guo-fang-lu-2-hao, Ĉinio
1842	Wang Yu	Suzhou-baita-dong-lu-tong-fang-yuan59-2001, Ĉinio
1843	Lin Wenxian	Suzhou-baita-dong-lu-tong-fang-yuan59-2001, Ĉinio
1844	Hu Menggu	eijing-hai-dian-qu-wan-shou-lu-jia-15-hao-yuan-8-hao-lou-301-shi, Ĉinio
1845	Wang Yujie	Jiangsusheng, Zhen-jiang-zhong-xue, Ĉinio

1846 Cao Lu Tian-jin-shi, He-dong-qu-wei-guo-dao-181-hao, Ĉinio
1847 Tang Anjie Hunansheng, Bing-zhou-fa-zhan-ji-hua-wei-yuan-hui, Ĉinio
1848 Hu Xu Hubeisheng, Wu-han-shi, Jiang-an-qu-xu-zhou-xin-cun-287-2-hao, Ĉinio
1849 Xiong Lijia Jiangxisheng, Nan-chang-nan-jing-xi-lu-165-hao-3-hao-xin-xiang-qun-6-xin-xiang, Ĉinio
1850 Shi Huimin Tianjingshi, He-ping-qu, Xin-hua-nan-lu-182-hao-408-shi, Ĉinio
1851 Su Yina Tianjinshi, He-xi-qu-long-du-hua-yuan-8-43-211, Ĉinio
1852 Wang Dong Tianjinshi, Hong-qiao-guang-rong-dong-li-mao-lou20-men-103-hao, Ĉinio
1853 Wang Jian Tianjinshi, Hong-qiao-guang-rong-dong-li-mao-lou20-men-103-hao, Ĉinio
1854 Gao Jing Tianjinshi, Hong-qiao-guang-rong-dong-li-mao-lou20-men-103-hao, Ĉinio
1855 Huang Rong Shan'xi-sheng-xi'an-shi, Chang-an-qu-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-203, Ĉinio
1856 ENKHEE Mongolio, ulaanbaafar, Bayanzurhducereg, lkhoro, 04-47, mn-210349-412, Mongolio
1857 Zhang Hong Beijingshi, Chang-ping-dong-san-qi-du-shi-fang-yuan-cui-hu-yuan-26hao, Ĉinio
1858 Zhao Junru Beijingshi, Dong-cheng-qu-dong-yang-guan-hu-tong-1-4-701, Ĉinio
1859 SASAKI 330-4, kami-komagino, shizukuishi-Choo, iuate-Gun, Iwate-ken, Japanio
1860 Jin Zhu Hubeisheng, Wu-chang-qu-shu-jia-jie-86-hao-6-hao-lou, Ĉinio
1861 Qijincongzi Hubeisheng, Wu-chang-qu-shu-jia-jie-86-hao-6-hao-lou, Ĉinio
1862 Zhang Lianjin Yunnansheng, an-ning-kun-gang-jin-chu-kou-gong-si, Ĉinio
1863 THEZE TQG HV, Anatole, Francio
1864 Qi-jian Yunnansheng, Kun-ming-chun-cheng-lu-195-hao-307-shi, Ĉinio
1865 Cui Jiayou Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1866 Ou Ziqi Beijingshi, 6317-xin-xiang, zhong-ruan-guo-ji-lv-you-xi, Ĉinio
1867 Huang Yanping Guangdongsheng, Guangzhou-li-wan-qu-nan-an-lu-zi-lan-xin-xiang-17hao-403, Ĉinio
1868 Wu-hanping Guangdongsheng, Guangzhou-bai-yun-ji-chang-ling-an-jie-2-hao-1204-fang, Ĉinio
1869 Yu Rongkang Hubeisheng, Jingzhoushi, Sha-shi, Tuan-jie-cun-10dong-1-6, Ĉinio
1870 Zhou Jun Beijingshi, Xi-cheng-qu-xin-jie-kou-qian-ma-chang-hu-tong-59-hao, Ĉinio
1871 Shi Xiaona Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1872 Zhang Xiaoxin Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1873 Zhao Bingguo Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1874 Wei Jiqun Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1875 Li Dong Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1876 Fan Bo Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1877 Liu Yi Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1878 Qin Dong Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1879 Wei Ganji Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1880 Yuan Pei Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1881 Yang Yang Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1882 Wang Qian Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1883 Peng Wansuo Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1884 Song Yizhang Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1885 Li Yabei Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1886 Xue Liaoyuan Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1887 Lin Qianfei Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1888 Guo Shanshan Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1889 Li Beibei Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1890 Xu Yan Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1891 Xie Qing Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1892 Wei Cheng Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1893 Hu Juanjuan Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1894 Fu Tingting Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1895 Chen Cheng Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1896 Chen Meng Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1897 Yang Xueting Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1898 Yin Fang Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1899 He Yanjun Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1900 Sun Limiao Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1901 Tao Jing Xi'an Chang-an-qu, Tai-yi-gong-xi'an-fan-yi-xue-yuan-xin-qu-202-ban, Ĉinio
1902 Li Jianghu Shan'xi-tai-yuan-jian-cao-ping-lv-guo-lu-2-hao, Ĉinio
1903 Geng Yuan Beijing-bai-wan-zhuang-da-jie-24-hao, Ĉinio
1904 Sun Xueyidan Beijing-bai-wan-zhuang-da-jie-24-hao, Ĉinio
1905 Wang Qi Beijing-bai-wan-zhuang-da-jie-24-hao, Ĉinio
1906 Zhou Lingtong Beijing-bai-wan-zhuang-da-jie-24-hao, Ĉinio
1907 Jiang Taiquan Neimenggu, Baotoushi, Bai-yun-qu-tie-kuang-zu-zhi-ren-shi-bu, Ĉinio
1908 Chai Shuchen Neimenggu, Baotoushi, Bai-yun-qu-tie-kuang-zu-zhi-ren-shi-bu, Ĉinio
1909 Wen Fulai Shan'xi-tai-yuan-shi, Ying-xin-jie-11-zhong, Ĉinio
1910 Wu Lin An-hui-sheng, Huang-shan-xiu-ning-xian-hui-xin-hua-yuan-5-zhuang-3-dan-yuan-102, Ĉinio
1911 Wu Fang Hunansheng, Chang-sha-jie-fang-zhong-lu-199-hao, Chang-sha-you-se-ye-jin-she-ji-yuan-lao-gan-ban, Ĉinio
1912 Wang Lin Beijingshi, Zi-zhu-yuan-lu, Guan-lan-guo-ji-hua-yuan-6-lou-1802-shi, Ĉinio

1913 Li Ze Beijingshi, Bai-wan-zhuang-da-jie-24-hao, Ĉinio
1914 Hao Lanpeng Neimenggu, Baotoushi, Kexie, Ĉinio
1915 Chen Ping Neimenggu, Baotoushi, Ming-tian-ke-ji, Ĉinio
1916 Wu Qiuxiang Guangdongsheng, Zhan-jiang-xia-shan-xin-yuan-lu-8-hao-3-zhuang-203, Ĉinio
1917 Li Wei Guangdongsheng, Zhan-jiang-xia-shan-xin-yuan-lu-8-hao-3-zhuang-203, Ĉinio
1918 Fang Jianwei Guangdongsheng, Shenzhenshi, Zi-mu-gang-Bei-qu, 71-302, Ĉinio
1919 Feng Peng Xi'an-shi, Jian-gong-lu-8-hao-Xi-an-shi-jie-yu-xie-hui, Ĉinio
1920 Li Hanyang Hunansheng, Changshashi, Fu-rong-qu-xiang-shao-cun-tie-lu-su-she-1-dong-402, Ĉinio
1921 Lin Yuzhong Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1922 Li Renzhi Heibeisheng, Lang-fang-dong-fang-da-xue-cheng, Ĉinio
1923 Yi Ding Beijingshi, Chong-wen-qu-jin-yu-chi-xiao-qu4-dong-B-2, Ĉinio
1924 Hu Yinghua Heilongjiangsheng, Qi-qi-ha-er-shi, Long-sha-qu-Wang-jiang-lu-34-13-hao Ĉinio
1925 Zheng Ruihan Heilongjiangsheng, Qi-qi-ha-er-shi, Long-sha-qu-Wang-jiang-lu-34-13-hao, Ĉinio
1926 Lv Shijun Jilinsheng, Yan-bian-yan-ji-zheng-fu, Ĉinio
1927 She Shijian Hunansheng, Changshashi, Yan-jiang-da-dao-232-hao, Ĉinio
1928 Sun Shilei Guangxi, Liuzhou-tie-lu-ju, -5-zhongxue, Ĉinio
1929 Yang Jin Fujiansheng, Ning-de-shi, Yuan-qian-lu-23-hao, Ĉinio
1930 Zhou Zhenghui Fujiansheng, Ning-de-shi, Yuan-qian-lu-23-hao, Ĉinio
1931 Liang Aichao Guangdongsheng, Guang-zhou-shi, Tian-he-lu-198hao-nan-fang-jing-dian-da-sha-8-lou, Ĉinio
1932 Zhang Xia Shandongsheng, Zao-zhuang-wen-hua-xi-lu-23-hao, Ĉinio
1933 Zhang Rui Shandongsheng, Zao-zhuang-wen-hua-xi-lu-23-hao, Ĉinio
1934 Zhang Hang Shandongsheng, Zao-zhuang-wen-hua-xi-lu-23-hao, Ĉinio
1935 Chen Kunxi Henansheng, Luo-yang-Dong-xi-qu-jing-hua-lu-8-hao, Ĉinio
1936 Li Xin Heilongjiangsheng, Ha-er-bin-shi, Xiang-fang-qu-xiang-fang-da-jie-15-hao, Ĉinio
1937 Cui Dayu Henansheng, Feng-qiu-xian-chengguan-xiang-bei-cui-zhuang, Ĉinio
1938 Li Xinyuan Heilongjiangsheng, Ha-er-bin-shi, Xiang-fang-qu-xiang-fang-da-jie-15-hao, Ĉinio
1939 Minin VLADIMIR Rusio RU-634063 ul LAZO 6/1 8, Rusio
1940 Minina SVETLANA Rusio RU-634063 ul LAZO 6/1 8, Rusio
1941 Feloman-Gorzalkz Ave. isks Fili 46 STA monica- Mexicali-bcn-meco, Mexico
1942 Feloman JODITH CECILIA Blas fiji 46 Santa Monica, Mexico
1943 Conde SUSANA AV LLVIS COMPANYS 29 5E5A -08190 ST CUGAT DEL VALLES-BARCELONA, Hispanio
1944 Klarita Velikova Janko Sakazor St 8-b PF5800, Bulgario
1945 Tilmont Anne ANTI M CLTE DES CARRIERES 10 1430 REBECQ, Belgio
1946 Rochelle F. Grossman 8050 Baxter Ave Apt 3D Elmhurst, NY 11373, Usono
1947 KIM YOUNG LONG 123-301 Hwaseong Mugunghwa APT Jaegung-dong, Gunpo-si Gueonggi-do Koreio
1948 Taniguchi Iwao 5-9-23 sumikawa 5J0 MINAMI-KO SAPPORO-SHI HOKKAIDO, Japanio
1949 NGUYEN THI F8JF KHU PHOF P. Binh Ti DongA Quan Binh Tan Tphochi minh vietnam, Vietnamio
1950 Langevin Anhui, Hefei Huposhanzhuang, 84 dong 109hao, Ĉinio
1951 Mac thi Kim Cuc 327 Phan DANG LIU D1 Q PHIC NHAN HUZCHIMINH USEO, Vietnamio
1952 Nguyen Dinh Long 501619 Nguyen Dinh chieu ph 3q ph nhuan Hochi minh, Vietnamio
1953 AREDA Shirhlhl ST CHACARA NO10 BEAZLAND.A DF BRASIL, Brazilo
1954 AREDA ADAIR ST CHACARA NO11 BEAZLAND.A DF BRASIL, Brazilo
1955 Dagra Gereltogtokh Mongolia 211240 Ulanbatoro-40 pk14, Mongolio
1956 Khuyag Tsetsegmaa Ulantator Bayanzurkh duereg durerdugeer khoreo 11-12, Mongolio
1957 Tserendorj ICHINOROV Mongol uls Ulaanbaatar Bayangoe duereg 1-r Khoroo 49-16 toot, Mongolio
1958 CHIMEDTSEREN ENKHEE Mongol uls Ulaanbaatar Bayangoe duereg 1-r Khoroo 04-47 MN-210349-412, Mongolio
1959 Sanjmiatav NARANTUYA Mongol uls Ulaanbaatar Bayangoe duereg 1-r Khoroo 04-47 MN-210349-412, Mongolio
1960 Karpati MICHAELO Rishon Le CIJON 75261 GLUSKIN STR 36, Israelo
1961 BEN-PORATH MOSHE g ROTSHELD ST NES EYONNA, Israelo
1962 BEN-PORATH KLORA g ROTSHELD ST NES EYONNA, Israelo
1963 BELLEFCUILLE 2372 HADDINGTON OFFAWA ONFAVIO, Kanado
1964 Tobisawa 30-3-909 miiminamimachi Neya6awa-shi osaka, Japanio
1965 Maeda 2-4-9-202 h02v6awadanchi kitakawaramachi Kameoka-shi, Japanio
1966 Lee CPO KESTO 3047 SEOUL Koreio
1967 Y SANO JOUKO Higashi-Ome 5-6-2-203 Oume-si TOKIO JP-198-0042, Japanio
1968 YASUMITSU Higashi-Ome 5-6-2-203 Oume-si TOKIO JP-198-0042, Japanio
1969 Liu Jianwei Beijingshi, Chaoyang-qu-dong-nan-san-huan-shi-li-he-jia-duo-li-yuan-B-zuo, Ĉinio
1970 Li Yuanlin Si-chuan-sheng, Mei-shan-shi-dong-bo-qu-mei-shan-yi-zhong, Ĉinio
1971 Fan Litong Heibeisheng, Tang-shan-shi, 13-hao-xiao-qu, Ĉinio
1972 Bai Mo Beijingshi, 8324-Xin-xiang, Ĉinio
1973 Fan Dongsheng Heibeisheng, Tang-shan-shi, 13-hao-xiao-qu, Ĉinio
1974 Moracchiato elsa C.60 A. Fogazzarom32-36700 vicenza, Italio
1975 Yamamoto Nioe 600-8803 Yabunouti-tyo, 13-3, Simogyo-ku, kyoto-si, Japanio
1976 Lepcenko Gennadij Rossija Vladivostok Karbiseva 48-19

Oni ridas (pri mi)

Oni diris al mi, ke troviĝas eraroj en nia ĉiutaga ĵurnaleto. Mi respondis, kompreneble. Krom tio, ke mia kapo mal-brile funkcias, mi estas tre laca pro nesufiĉe da dormo. Sciu, ke mi kaj miaj kolegoj laboras – hu! - en la redaktejo de malfru-matene (8:00) ĝis fru-matene (2:00 aŭ pli). En numero 2 ni raportis, ke 10 prelegis en NITOBÉ-simpozio el kiuj 30 estas ĉinoj! Do parto estas pli granda ol la tuto! Ridindege! Nun, mi petas pardonon de vi, legantoj! Feliĉe dank' al via konstanta kontribuo, oni jam povas trovi la veron. En numero 4 de nia ĵurnaleto, oni legas, ke 50 ĉeestis la simpozio. Do 10 ĉinoj konsistigas parton de la tuto. Jen ĉio klara.

Mi diru, se nia ĵurnaleto ellasas ion, kulpas mi kaj ne vi. Via laboro kontribuos al nia afero, ĉu ni akurate raportas aŭ ne.

Sendube, ni laŭeble malpliigos erarojn. **Wen Jingen, Redaktanto**



Nova UEA-estraro Sin Prezentas Je la 9-a horo de la 29-a kunsidis la nova estraro de UEA en halo *Wensing*. Al la kunsido venis multaj samideanoj kaj esprimis varman gratulon al la estroj, precipe al la virinoj, la plimulto de la estraranoj. Yu Tao, la plej juna estro el Ĉinio, respondecas pri azia agado, amiko de Esperanto. La nove elektita ĝenerala sekretario Ulla Luin menciis kvar punktojn: mono, junuloj, aktiveco kaj iniciatemo kaj organiza stabileco por sia estonta agado. Ĉiuj bondeziras al ili sukcesan servadon. Raportis **Eta**

Mi kaj Esperanta Elsendo de Ĉina Radio Internacia

Xia Jixuan vicdirektoro de ĈRI

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi varme vin bonvenigas, en la nomo de Ĉina Radio Internacia! Mi gratulas niajn karajn aŭskultantojn-amikojn, kiuj gajnis la premiojn! ĈRI, kiel unu el la plej gravaj amaskomunikiloj de Ĉinio, portas gravan taskon konigi Ĉinion al la mondo kaj la mondon al Ĉinio kaj raportojn de la mondo al la mondo. Ĉiutage ni faras disaŭdigon al la mondo en 43 lingvoj, elsendas gravajn novaĵojn de Ĉinio kaj de diversaj lokoj de la mondo, konigas pri la 5-miljaraj historio kaj kulturo kaj pri ŝanĝigo de ĉi tiu antikva tero de post la reformado kaj malfermo. Por pliprofundigi informitecon de diversalantaj homoj pri la ĉina nacio, plifortigi la amikecon kaj por la paco kaj evoluo de la mondo, ni faris meritajn kontribuojn. Pasintjare nia Radio ricevis pli ol milionon kaj kvincent milojn da leteroj de niaj aŭskultantoj el 162 landoj – tio estas rikolto post nia diligenta laborado.

Kompreneble, la rikolto entenas klopodadon ankaŭ de kolegoj el la Esperanta Redakcio de nia Radio.

La Esperantaj disaŭdigo kaj reto okupas gravan lokon en ĈRI, ĉiam alte taksate kaj subtenate de la ŝtato. Nia Esperanta Redakcio ne nur faras disaŭdigon kaj retpaŝon, sed ankaŭ eldonas la trimestran revueton MIKROFONE kaj gvidas Esperantan kurson en Pekina Brodkasta Universitato. Dank' al ĉio ĉi, ĝia influo pli kaj pli vastiĝas. Kaj, cetere, el tio oni vidas grandan vivipovecon de Esperanto, kiu entenas la idealon de la homaro pri komuna lingvo. Jen pruvo, ke vi venis de malproksime al la ĉina ĉefurbo por partopreni en la Universala Kongreso.

Profite de la Kongreso ni invitas vin al la premia ceremonio pri Mi kaj la Esperanta Disaŭdigo de ĈRI, por celebri la 40-jariĝon de la Esperanta disaŭdigo.

Majstro Zamenhof diris: "Amiko fidela estas trezoro plej bela". Vi ĉiuj estas niaj fidelaj aŭskultantoj kaj fidindaj amikoj, vi do certe estas trezoraj por ni. La nuna aktivado ja proksimigas niajn korojn.

Fine, mi citu jarmile aforismecajn versojn de la antikva poeto Wang Bo,
*Amikojn havu ĉie sur la ter',
intimo regas do sub la ĉiel'.*
Eterne verdu nia amikeco!
Brilan sukceson al la 89-a Universala Kongreso de Esperanto!
Dankon!

Premiado de artikolo-kontribuo

Premiado de artikolo-kontribuo en ĈRI (foto) La 27-an de julio, kadre de la 89-a UK, okazis en Ĉina Radio Internacia ceremonio por premiado de la artikolo-kontribuo titolita "Mi kaj la Esperanta Elsendo de Ĉina Radio Internacia". Ĉijare estas la 40-a jariĝo de la Esperanta disaŭdigo de ĈRI. Ekde la 19-a de decembro pasintjare, oni jam komencis la aktivadon de la artikolokontribuo. Ĝis la fino de junio, ni ricevis pli ol 50 kontribuojn el pli ol 20 landoj.

Sinjoro Leopold Patek el Aŭstrio gajnis la speicalan premion, sinjoro Rokura Makabe el Germanio kaj sinjoro Tadacuma Nomura el Japanio respektive gajnis la duan kaj trian premiojn. Eksa prezidanto de UEA sinjoro Kep Enderby kaj vicdirektoro de ĈRI Xia Jixuan disdonis la premiaĵojn.

Ĉeestis la ceremonion pli ol 60 kongresanoj el dekelkaj landoj.

Ĉu vi trovis, ke eraroj malmultiĝis en nia ĵurnaleto? La kialo estas, ke ni nun havas majstron kiu kontrolas nian presprovaĵon. Li estas korektisto de la revuo *Esperanto*, la organo de UEA!



Majstra korektisto **Robert Moerbeek** volontule laboras por nia ĉiutaga ĵurnaleto.

Kio Okazis

ESPERANTLINGVA VERKISTA ASOCIO JARKUNVENIS

La salono Lapenna gastigis jaŭdon la 29an de julio je la 10a Jarkunveno de Esperantlingva Verkista Asocio gvidata de la EVA-estraranoj Spomenka Štimec, Anna Loewenstein kaj Paŭlo Gubbins en ĉeesto de dudeko da kongresanoj.

Dum la kunsido oni aparte dankis pro la literaturaj atingoj al la ĉina verkisto Laŭlum, la legendo de la ĉina literatura Esperantujo, al kiu per speciala koverto omaĝis ankaŭ la Ĉina Poŝto. Estis prezentita la agado de novaj ĉinaj membroj de EVA: Shi Chengtai, kiu lastatempe ĉinigiis la libron "7000 tagoj en Siberio" de Karlo Ŝtajner.

Apartan kortuŝon de la ĉeestantoj elvokis la prezento de mane kopiitaj Esperantaj libroj, kiujn en la 70-dekaj jaroj por sia kleriĝo kreis Hu Guozhu.

Post la jarraporto de la sekretario, la kasista raporto oni diskutis pri la laborplanoj por 2005. La plej interesaj projektoj de EVA aktuale estas: Preparo de **Kolekto de originalaj dramoj**, prizorgata de verkistoj Marjorie Boulton kaj Paul Gubbins. Ili ĝis nun sukcesis kolekti ĉ. 300 originalajn drametojn kaj dramojn por la estonta libro. Se vi konas iun nekonatan dramatan tekston bv. kontakti Gubbins, KN 174. Alia interesa projekto estas preparo de **Leksikono pri esperantlingvaj verkistoj**, por kiu ĝis nun kolektiĝis ĉ. 500 biografioj de verkistoj kiuj verkas en Esperanto. Prizorganto estas S. Štimec, KN 0521, kiu invitis al kunlaboro por pliriĝi la verkon.

Dum la kunsido kreiĝis la ideo ĉe la venonta UK kunligi literaturan temon kaj la Esperantologian konferencon.

Raportis **S. Ŝ.** KN 0521

Budhista Kunveno

Okaze de la UK, ĉeestantoj budhanoj jam kunvenis dufoje. Unue, ekster la oficiala programo, dek budhanoj kune pilgrimis al du famaj budhismaj temploj en la urbo; kaj due okazis, jaŭde, la oficiala kunveno de Budhana Ligo Esperantista. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj. Post prezento kaj libera interparolo, la kunveno finiĝis per recitado de la Koro-sutro en la japana, ĉina, vjetnama kaj korea lingvoj, kaj per Karaniya-metta-sutta en la palia originalo kaj en Esperanta traduko. **Gunnar Gällmo**, KN 216, gllm-s

Amikaro Bruno Gröning

Saniĝintoj raportis mardon posttagmeze en la prelego pri "saniĝo per spiritaj fortoj laŭ la instruo de Bruno Gröning". La aŭskultantoj havis la eblecon akcepti la sanigan forton. Je la komenco kaj je la fino tio okazis kun muziko de la filmo "La Miraklo-apostolo". Krome Detlef Meier prezentis la vivon de Bruno Gröning (1906-1959) kaj la bazon de lia instruo. Poste Detlef Meier raportis pri sia saniĝo-kutimo, per kiu li evitis pensiĝon en la aĝo de 32 jaroj. Gerhard Schäffler raportis pri saniĝo de ekzemoj sur la tuta haŭto kaj Harold Hombach de dorsodoloroj. La lasta impeto de la prelego estos vendredon 13:45 en salono *Chun-chan Yeh*.

Detlef Meier, KN 878

Komunista Kolektivo pridiskutis la socialismon



Jen kelkaj el la pli ol 30 kongresanoj kiuj ĉeestis la kunveno de IKEK, la Internacia Komunista Esperantista Kolektivo, je dimanĉo. Ĉirkaŭ duono el ili apartenas al iu komunista aŭ socialista partio aŭ organizaĵo en sia lando, dum ĉiuj interesiĝis pri la multaj levitaj temoj:

- Kiel komunistoj kontribuu al la kongresa temo – lingva demokratio?
- Ĉu socialistaj esperantistoj voĉdonu por esperantista partio (en Eŭropa Unio) aŭ socialista?
- Kiel disvastigi kaj plibonigi la gazeton de IKEK, *Internaciisto*?
- Ĉu Ĉinio estas socialisma lando?
- La socialismo, kiel transiro de la monda kapitalismo ĝis la monda komunismo.
- La duon-demokratio de la kapitalismo.
- Ĉu la socialismo eblas sen demokratio?
- Ĉu paca transiro al la socialismo eblos?

Kongresano havos plian ŝancon renkonti komunistojn je la 11-a horo vendrede dum la kunveno de la laborista esperantista movado, Sennacieca Asocio Tutmondo. Kadre de SAT, la komunistoj sin organizas en Komunista Frakcio.

Raportas: IKEK-Prezidanto **Stan Keable**, KN926

Tel: 0044 7866 606 085, keablestan@aol.com

ILEI/UEA Internaciaj Ekzamenoj

Ĵaŭde finiĝis la kongresa sesio de la internaciaj ekzamenoj, dum kiu mezuriĝis 12 personoj. El la kandidatoj 6 esperantistoj sukcesis kaj ricevas atestilon pri siaj konoj. La trapasintoj je elementa nivelo estas **Honda Terumi, Yas Kawamura kaj Masayuki Kobayashi** el Japanio. La meznivelaĵojn taskojn plenumis **Aida Cizikaitė** el Litovio, **Nguyen Xuan Thu** el Vjetnamio kaj **Song Bin** el Ĉinio.

Ni kore gratulas al la novdiplomitoj kaj kuraĝigas al plulernado tiujn, por kiuj mankis ankoraŭ iom da konoj por plenumi la ne ĉiam facilajn taskojn.

La festa disdono de la atestiloj okazos **vendrede 10:45** en la **salono Ĵelezo**, tuj post la programo de la Konversacia Rondo. Ni invitas la interesitojn kunfesti kaj kunaplaŭdi! **Katalin Kovats**, prezidanto de la ekzamena komisiono

Ĝemelaj urboj

Estas evoluanta la projekto "Ĝemelaj Urboj"

Helpe de la komisiito de UEA pri la projekto "Ĝemelaj Urboj", je la 18a horo de la 29a de julio, s-ro Hideki HARADA el la urbo Okayama en Japanio finfine trovis s-ron Ji Feng, esperantiston el la ĉina ĝemelurbo Luoyang. Antaŭ ilia renkonto ili jam korespondis 20 jarojn. S-ro Hideki HARADA opiniis, ke la projekto "Ĝemelaj Urboj" estas tre grava por akceli la E-movadon kaj ĝemeliĝon inter urboj.

Raportis **Wu Guojiang** KN0473

Subkomitato 5 pri kulturo kaj utiligo de Esperanto

Kunsidis la 27an de Julio 2004 en salono Chun-Chan Yeh de 10 ĝis 11.30. Partoprenis 25 kongresanoj. Prezidis Spomenka Ŝtimec.

Post vigla diskuto, en kiu oni kiu superrigardis la ĝisnunan aplikon de la uzo de Esperanto en ekz. plastika arto (ZEOj), turneigo de muzikistoj - esperantistoj, kaj ĝis nun nesukcesa agado por kreo de filmo pri ekz. Zamenhof fare de famaj filmregisoroj okupigantaj ekz. Pri socie gravaj temoj kia genocido, la interparoloj fokusis ĝis al literaturo. Oni konkludis per jenaj **Rekomendoj cele al pliforta utiligo de Esperanto**

1. Krei UEA-premion por kultura evento de la jaro kiu stimulu aplikon de Esperanto sur kultura kampo
2. Krei liston de tradukistoj el Esperanto. (eventuale ankaŭ ĉe la tt-ejo de EVA) Iniciati kutimon de eldonejoj provizi la tradukistojn per la nove aperintaj verkoj por rapidigi la informfluan
3. Krei liston de la plej tradukendaj verkoj el Esperanto nacilingven por helpi al tradukemuloj, kiuj interesiĝas pri traduko per Esperanto kiel lingva ponto. Ekzemplaj libroj: "Zamenhof-Strato", "Vualo de l' silento", "La ŝtona urbo" k.s.
4. En la revuo "Esperanto" publikigi plurajn prezentojn pri tradukistoj el Esperanto nacilingven por diskonigi kiu laboras pri Esperanto-lingvoponto
5. En Biblioteko Hodler krei kolekton de nacilingvaj manuskriptoj ricevita per Esperanto kiuj atendas publikiĝon por savi la laboron faritan
6. Pri kandidato por Nobelpremio William Auld, starigi en pluraj Libroservoj specialan tablon kun nur liaj libroj kun okulfrapa informo pri kandidatiĝo por helpi informi pri la Nobelbelpremia kandidato el Esperantujo.
7. Plifortigi la laboron ĉe eŭropaj instancoj pri Esperanto kiel

lingvoponto utiligante interalie la novelektitajn parlamentanojn esperantoj.

8. Oftigi la prelegvojaĝojn por pliintensigi rektajn informfluojn
9. Kutimigi verkojn al pli ofta provizo de verkoj per glosoj por eviti elitisman publikigon kaj faciligi al la legantoj la aliron al la verkoj.
10. Persiste observi la regulon ke neparenca-lingvano, fake kaj lingve sperta, kontrolu la lingvouzon antaŭ ol la libro aperu. Protokolis S. Ŝtimec

Kio Okazos

Malferma Bahaa Kunsido Tagmeze, la 30an de julio – Hujucz

Aŭtora duonohoro por vendrede, 30a de julio 11:30-12:00

S-ro MINE Yositaka el Japanio parolos pri siaj kolektoj de verkoj de Eroŝenko. Eroŝenko (1890-1951) estis nevidanta esperantisto homarana, kaj gastis ĉe *Lusin* en la 1920-aj jaroj en Pekino. KN 0238, **MINE Yositaka**, Japanio

Posttagmeze je 16.30, ĉiam en la Libroservo, Ionel Onet prezentos siajn lastatempajn eldonaĵojn ĉe la Eldonejo Bero kaj aliajn novajn librojn aĉeteblajn en la Libroservo.

Oratora Konkurso

u vi aĝas malpli ol 30 jarojn?

u vi volas gajni altvalorajn premiojn?

Venu vendrede en salono *Hodler* je la 15:15 kaj partoprenu la oratoran konkurson! Parolu dum ne pli ol 10 minutoj pri unu el la jenaj temoj:

- 1) Lingva egaleco en internaciaj rilatoj;
- 2) libera senpaga kopiado de muziko: kion fari?
- 3) kial lerni Esperanton?

Kaj internacia ju -komisiono a skultos vin kaj decidus!

u vi a as pli ol 30 jarojn?

Venu kaj a skultu la junulojn kiuj estonte estos la plej aprezataj oratoroj de la movado!

Internacia Arta Vespere

Ĉiuj partoprenontoj (ludantoj, kantantoj, dancantoj, deklamantoj) al la Internacia Arta Vespere devas esti vendrede je 14:00 en la salono *Zamenhof*. La organizantoj dankas. **Mireille Grosjean**, KN 517

Anonco: Perdita japanlingva libro

Dum la kunveno de Esperantlingva Verkista Asocio iu forportis el la kunvenejo la libron en la japana "Mirindaj aventuroj de metilemanto Hlapiĉ." Bonvolu redoni ĝin por la KN 0521 en LKK-ĉambro.

ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo) invitas la publikon al Forumo pri Ateismo en Orienta Azio Nuntempe, vendredon la 30an de julio, 12:45-13:45, en salono elezo. Gvidos la forumon s-ro Yamasaki Seikō; parolos kongresanoj el inujo, Japanujo, Koreujo.

Anonco pri forveturo al flughaveno

Ĉu iu veturos taksie la 1-an de a g. inter la 7a kaj la 8a horoj matene al la flughaveno? Ekirpunkto proksimaĵo de la kongresejo. Ser ata kunvoja onto. Bv. lasi mesa on sur la Rendevua Tabulo por KN 0521

Anonco pri prezentado de libro en la libroservo

Vendredon la 30an de julio, prezentos du el siaj libroj Christian Rivière KN841 el Francio je la 10a horo kaj duono. Li prezentos la novelaron "Ŝakvojo" kaj precipe la tradukon de la furora franclingva "Matin brun" (en Esperanto "Bruna mateno").

Rudolf Burmeister en Chemnitz, Germanio

Leganto skribas al ni:

* Grandan gratulon al Ĉina Esperanto-Ligo pro la aperigo de la belega kongresa poŝtmarko. Kaj dankon al la redaktoro de la kongresa kuriero pro la sciigo pri ĝi! Hodiaŭ mi jam eksciis pri la apero dank' al la reta kuriero! Tiel mi jam povas envicigi informon en nia E-filatela informilo *LA VERDA LUPEO* (de ELF/AREK).

* *Homa Familio* - 4

Kiu en la foto estas vicurbestro de Pekino? La dekstra aŭ maldekstra persono? (**Redaktanto respondas:** la dekstra estas la vicurbestro).

Al mi tre plaĉas via kuriero, tiun nunan mi jam povis legi en mardo je la 17a horo! Do, pli frue supozeble, ol vi ĝin enretigis...

Amike

Rudolf Burmeister en Chemnitz - Germanio

Oni Plendas

Mi bedaŭras ke ne okazis kunveno pri Afrikaj Agadoj de Esperantistoj en Afriko kaj de Esperantistoj el aliaj kontinentoj pri Afriko. **KN 596**

Komisiono pri virina agado

Se vi havos intereson pri virina agado, bv. aliĝu al

komisiono-pri-virina-agado-subskribe@yahoogroups.com kaj poste uzu la adreson de komisiono pri virina agado jen:

komisiono-pri-virina-agado-de-uea@yahoogroups.com. Se vi havos alian demandon, bv. turnu vin al Hortensio, KN 893.



Gratulegon por la nov-elektita estraro kiu pliniĝis. Jam ni pripensis skribi protestleteron al la UEA-estraro pro la troaĝa vireco. S-ane salutas **Malino**. **D. Rooke**, KN 89

Hodiaŭa Vetero: sune kaj nube;
30°C



Eterna Beno8

Kuriero de 89a Universala Kongreso de Esperanto

via ĉiutaga ĵurnaleto

sabato 31a de julio, 2004

Novaj Aliĝoj

KN	Nomo	Adreso
1977	ASADA HIROKO	4-11-11 AMANOGAHARACHO KATANO-SHI OSAKA, JAPANIO
1978	IMANISHI ISHIO	3-5-29 TACHIBANACHO IMABARI-SHI EHIME
1979	IWASAKI KUNIO	17 SHIMMACHI AYABE-C KYOTO JAPANIO
1980	IWASAKI MITSUKO	4-6-10-416 HAKATACHO IZUMI-SHI OSAKA JAPANIO
1981	UESAKI AIKO	254-913 KIZUCHO YODO FUSHIMI-KU KYOTO-SHI KYOTO, JAPANIO
1982	KATO YUGO	1-19-21-501 KITAKOSECHO KAMEOKA-SHI KYOTO
1983	KANAOKA TATSUYA	6-20 MAEDACHO ASHIYA-SHI HYOGO, Japanio
1984	KANAKOGI TATSUE	1-1 HONGUCHO AYABE-SHI KYOTO, Japanio
1985	KANAKOGI TOKIO,	JAPANIO
1986	KAWAKITA AKARI	440-3 MATSUBARA SHIROTORICHO OKAWA-GUN KAGAWA JAPANIO
1987	KAWAKITA AYAKO	440-4 MATSUBARA SHIROTORICHO OKAWA-GUN KAGAWA JAPANIO
1988	KAWAKITA SAORI	440-5 MATSUBARA SHIROTORICHO OKAWA-GUN KAGAWA JAPANIO
1989	KITAGAWA YOSHIHIROSHIGA	41-609 YASUSATO TODO UJI CITY KYOTO JAPAN
1990	KIMURA ARINA	29 NISHIKAYA HOMMECHO KAMEOKA-SHI KYOTO JAPANIO
1991	GOCHO MITSU HARU	2-31-3 SAKURADAI ICHIHARA-SHI CHIBA JAPANIO
1992	KONDO KAMEJU	6-1 MINAMI9JO SHIMIZUCHO KAMIKAWA-GUN HOKKAIDO JAPANIO
1993	SAITO MINORU	1639 BENRI ASASHIMURA KIKUCHI-GUN KUMAMOTO JAPANIO
1994	SHIROMOTO KIMINORIKUMAMOTO	308-1 SHIGEMI KIKUCHI-SHI KUMAMOTO JAPANIO
1995	SHIROMOTO MASUMI	308-1 SHIGEMI KIKUCHI-SHI KUMAMOTO JAPANIO
1996	TAKADA KINUE	8-2 KITAOTOSHICHO NEYAGAWA-SHI OSAKA JAPANIO
1997	TANAKA HIROFUMI	1-1 HONGUCHO AYABE-SHI KYOTO JAPANIO
1998	NAGASAWA KIICHIRO	12 KOSUMI JISSE TAMBACHO FUNAI-GUN KYOTO JAPANIO

Ne forgesu preni hodiaŭan kroman paĝon post la Fermo!

1999	HIRAOKA ITSUKI	3-10-18 TSUKAGUCHICHO AMAGASAKI-SHI HYOGO JAPANIO
2000	HIRANO KIYOTAKA	56 MINAMIRYOMACHI NISHINOKYO NAKAGYO-KU KYOTO-SHI KYOTO JAPANIO
2001	FUJIMOTO MICHIE	4-5-6 KORIGAOKA HIRAKATA-C OSAKA JAPANIO
2002	MATSUURA KUNIKO	4-28-10-103 YOYOGI SHIBUYA-KU TOKYO JAPANIO
2003	MATSUSHITA KEIKO	1-5-2-604 MUSHITORI IZUMIOTSU-SHI OSAKA JAPANIO
2004	MIYAGAWA TOYOKO	52 KONYAMACHI KAMEOKA-SHI KYOTO JAPANIO
2005	TANIGUCHI IWAO	IWAO 5-9-23 SOMIKAWA 530 MINAMI-KO SAPPORO-SHI HOKKAIDO JAPANIO
2006	MIYOSHI ETSUO	440 MATSUBARA HIGASHIKAGAWA-SHI 769-2702 JAPANIO
2007	WANG WEI	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2008	GUO YAJIE	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2009	LŪ ZHUOLIN	Jilinsheng, Yanjishi, Yanbian-2-zhong, inio
2010	Liu Xiao	Jilinsheng, Sipingshi, Yingxiongjie, shiwei-1-zu, inio
2011	Gao Jingmin	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2012	Li Huaiying	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2013	Du Xiuqin	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2014	Wang Yan	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2015	Xue Ran	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2016	He Libin	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2017	Su Yuqing	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2018	Yuan Haiyan	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2019	Cheng Yan	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2020	Yu Tonglian	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2021	Su Yijun	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2022	Liu Hanlan	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2023	Ma Guichun	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2024	Sun Xiaofei	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2025	Wang Yong	Beijing Baiwanzhuang Dajie 24-hao, inio
2026	Gao Wenmei	Liaoningsheng, Shenyangshi, Huangguqu, Balangou-315dong, 6-5-1, inio
2027	Yu Youjun	Liaoning, inio

Kian preparadon mi faris antaŭ kaj por la 89-a UK?

Li Changlu, KN 435

Lutage antaŭ du jaroj, mi okaze aŭdis ke la 89-a UK okazos en Pekino en 2004. La informo re-estigis ĉe mi fervoron por Esperanto, tiam mi jam longe silentiĝis en Esperantujo, kiun mi amas kare. Mi ekpensis, kiel mi partoprenos en la UK, ĉu mi krokodilos dum la UK kaj ĉu mi kapablas interŝanĝi pensojn kaj sentojn kun eksterlandaj s-anoj.

Tiam mi ankoraŭ ne kapablis paroli tute en Esperanto, nek aŭskulti bone paroladon de eksterlandaj esperantistoj, nek pensi tute en Esperanto. Unuvorte, mi ankoraŭ ne posedis la lingvon. Por ĉeesti la UK, mi konsciis, antaŭ ĉio mi devas altigi mian lingvo-kapablon. Kie kuŝas la problemoj? Mi demandis min kaj eltrovis respondon al la demando.

Unue, al mi mankas vortoj. Vortoj funkcias kiel brikoj en dom-konstruo. Kiel lerni pli multajn vortojn? Mi estas malsaĝa kaj mallerta, tiel mi decidis lerni mallerte. Mi komencis tralegi vortaron, de la unua ĝis la fina paĝo. Post tra-legado, mi ekkonis pli ol unu oftan signifon de multaj vortoj. Kvankam mi ne povas enkapigi ĉiujn vortojn, tamen ofte uzitajn. Parkerigi vortojn fariĝis por mi pli kaj pli interesa lernado. Mi akumulis vortojn kaj provis uzi ilin en parolado. Eĉ tiel, mi ankoraŭ ne bone posedas la lingvon. Precipe mi ne bone orele komprenis aliajn. Kion fari?

Due, mi komencis legi legaĵojn, romanojn, novelojn, poemojn, prozaĵojn kaj eseojn. Multaj el ili estas originale verkitaj de famaj esperantistoj en- kaj eksterlandaj, ekz. *Vivo de Zamenhof*, *Marta*, *Faktoj kaj Fantazioj*, *Ĉu Li Bremsis Sufiĉe?*, *Kara Diablino*, *Kaverno apud la Maro*, *Aŭtuno en la Printempo*, *Hamleto*, *Paŝoj al Plena Posedo* ktp. Post legado, mi eksentis ke Esperanto estas tre bela lingvo.

Trie, mi utiligis kelkajn babilejojn, kiaj "Kaleria", "Verdreto", "Ĝangalo", "Paltalk" kaj "Skype", en la interreto por interbabili kun esperantistoj eksterlandaj dum du jaroj. Komence mi babilis per tajpado, tiel, mi plilertiĝis en fraz-farado kaj vorto-uzo, kaj samtempe mi akiris sperton kaj amikiĝis kun multaj s-anoj en- kaj eksterlandaj. La interreto bone pruvis ke Esperanto estas ne nur vivanta lingvo artefarita, sed ankaŭ utila komunikilo internacia.

Kvare, mi ankaŭ verkis en Esperanto. Mi pensas eĉ kaj cerbumas en Esperanto. Por diri la veron, mi ne estas poeto kaj verkisto, tamen mi progresas en verkado. Mi devigas min uzi Esperanton ĉiam kaj ĉie. Ju pli mi verkas kaj legas, des pli mi amas Esperanton.

Kvine, tiam, kiam restis ĉ. 100 tagoj antaŭ la 89-a UK, aperis en mia kapo ideo, kiel kompetente mi povos uzi la lingvon, se mi nur aŭskultos Polan Radion dum la 100 tagoj. Mi ekprovis kaj sukcesis aŭskulti grandparte la enhavon. Antaŭe mi ĉiam sentis la parolon de Pola Radio tro rapida, sed nun ne plu. Nun mi jam povas interbabili pli flue kun esperantistoj eksterlandaj.

Fojfoje mi demandis min: "Ĉu mi sufiĉe preparis min por la UK?" Mi ja ne estas certa pri tio. Mi eĉ timas, ĉar mi scias ke mia scio de kaj pri Esperanto ja estas tre malmulta. Mia preparada lernado estas ne nur por la UK, sed ankaŭ por praktikada celo de Esperanto.

Lu Jixin: Poeziaj Bildoj de Lotus Lotusfloro estas amata de ĉinoj tra jarcentoj. Tamen ŝajnas, ke nemultaj artistoj trovis la diversecon de la belo de la floro kiel trovis Lu Jixin (KN 1211), talenta ĉina Esperanta poeto el la fama ĉe-akva urbo Guilin. Lia ekspozicio de fotoj de lotus-floroj kun peomoj kaj kantoj en la Libroservo admirigas vidantojn. Liaj bildoj kombinas lian poezian vervon kun lia okulo por belo en naturo.

Raportis nia raportisto

Ĝis Revido en Vilnius en 2005!

Kio okazis

ORATORA KONKURSO

Naŭ kandidatoj (KN-oj: 230, 478, 485, 736, 743, 1265, 1337, 1563 kaj 1664) anoncis sin por la Oratora Konkurso (vidu paĝojn 50 kaj 51 de la Kongresa Libro) kiu okazis vendrede en salono Hodler. Oni ĝojis pri tiom da sinanonoj sed la asignita tempo ne sufiĉis por permesi al ĉiu kandidato paroli dum pli ol 7 minutoj. La juĝkomisiono konsistis el S-ro Masterman (KN 147), s-ino Tan (KN 135) kaj s-ino Grattapaglia (KN 526).

Kvin el la 9 kandidatoj estas ĉinaj kaj ke ĉiuj kandidatoj parolis kun sufiĉe multe da memfido kaj verve.

Laŭ la regularo pri la konkurso, tri premioj povas estis asignitaj, sed du kandidatoj havis la samajn poentojn por la dua premio. La rezulto estas:

- Unua premio: s-ro Cassius Genesio Desconsi, Brazilo, KN 1563, pro la temo “Kial lerni Esperanton?”
- Dua premio: s-ro Christopher Culver, Usono, KN 743, pro la temo “Libera senpaga kopiado de muziko: kion fari?”, kaj s-ro Andreo Korobejnikov, Rusio, KN 1664, pro la temo “Kial lerni Esperanton?”
- Tria premio: f-ino Peng Nian, Ĉinio, KN 1265, pro la temo “Kial lerni Esperanton?”

ĉiuj gajnintoj ricevas valoran premion kaj diplomon.

Diccon Masterman, KN 147

SAT-kunveno okazis 10:00-11:30, vendrede, 30an julio, en salono *Ĵelezo*. Ĝi estis prinotita kiel sennaciistoj, sed SAT ne estas asocio sende sennaciistoj, kiuj formas sine de SAT unu frakcion (fakon).

Dabatoj estis viglaj, interalie oni arde diskutis pri tio, ĉu SAT estas nur por edukado de laboristaro aŭ, ĉu pli engaĝigo ne estas bezonata.

YAMASAKI KN 0053

Ĉu Esperanto iĝos komuna lingvo de Eŭropa Unio?

Vendrede la 30an de julio okazis kunveneto, kiu intencis proponi al ĉiuj 25 landoj el EU prepari esperantistajn listojn por la venonta batalo 2009a, kiel en Francio en 2004. Ili proponas al ĉiuj interesatoj kontakti:

michel.fontaine13@waradas.fr (KN 1511) aŭ poŝte KN 0592 kaj la retejo www.e-d-e.org

Komercistoj kaj ekonomistoj kunvenis

Ĵaŭde posttagmeze Prezidanto Franz Josef Braun povis saluti en la ĝenerala kunveno (jarĉefkunveno) de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) rekordan nombron de ĉeestantoj iam ajn: 107 personoj, inter ili 30 membroj. Li donis superrigardon pri la ĉefaj datumoj kaj pri aktivecoj kaj financa rezulto de la fakgrupo en la jaro 2003. La reelektitaj estroj estas s-ro Braun (prezidanto), d-ro Rainer Kurz (estrarano) kaj s-ro Wang Tianyi (estrarano, KN 1277); novaj kandidatoj ne eestis.

Wang malfermis la sekvanta diskutado per sia prelego “Praktiko kaj problemoj en la Esperantista komerco”, kiu montris la grandegan intereson pri Esperantista komerco en aziaj landoj. IKEF prezentis la nove aperintan “Borsan Terminaron” de Hans Wiersch, promociata de IKEF. La prezidanto anoncis reorganizadon de la membrara administrado helpe de elektronika datumbanko. Raportis **FJB**, KN 563

Kristanoj

Dimanĉon, la 25an de julio, la kristanoj invitis al ekumena Diservo. Preskaŭ centoj de la kongresanoj partoprenis la kunvenon, kiun antaŭ zorge preparis pastro Albrecht Kronenberger el Germanio. Ĉiuj miris pri la riĉeco de kantoj prenitaj el la ekumena preĝ- kaj kant-libro *Adoru*, ĉar tiuj kantoj venis al Esperantio el la tradicioj germana, sveda, korea, itala, kaj el la gregoria tradicio, flegata precipe de la katolika eklezio. Pastro Bernhard Eichkorn, kiu gvidis la Diservon.

Ĵaŭdon, la 29an de julio, la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista IKUE kune kun la Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI okazigis kongresan kunvenon por ĉiuj interesigantoj. Post kanto kaj salutoj Flory Witdoeck invitis al la 100-jariĝo de la unua Universala Esperanto-kongreso en Boulogne sur Mer, kiu okazos je Pasko 2005 en Bologne sur Mer, Francio. Giovanni Damini trandonis inviton al la 17a Ekumena Kongreso, kiu okazos en Hungario venontjare en la semajno antaŭ la Universala Kongreso. Aliaj demandoj okupis la partoprenantojn, ĝis pastro Bernhard Eichkorn finis per kanto el la libro *Adoru*.

Bahaa Kunsido

En la bahaaa kunsido dek kvin homoj el dek unu landoj partoprenis prelegon faritan de Paŭl Dessailly kaj Martin Langevin; Velanta

Kiu estas kiu?

Portretoj skizitaj de Ĉan Kuan Ngok, KN 1514 Laŭlum, prezidanto de Internacia Kongresa Universitato



Piano-koncerto

Dessailly registris la detalojn jene: Kvin bahaaj esperantistoj kunvenis respektive el Aŭstralio, Bulgario, Ĉinio, Germanio kaj Kanado. Esperantistoj el Svislando, Afganio, Usono, Japanio, Belgio kaj Koreio partoprenis ankaŭ. Dore Renato Corsetti kaj Prof Wedel transdonis siajn bondezirojn al la kunsido.

Dum la kongreso, oni ankaŭ forprenis centojn de bahaaj libroj kaj folioj en la Ĉina, angla, japana kaj korea lingvoj; sed la plejmulto kompreneble en la Internacia Lingvo. **Martin Langevin** KN1950

Grava Anonco por Kongresanoj el Azio

Vi povas ricevi *senpage* libron en la Libroservo, se vi estas kongresano el Ĉinio, Nepalo, Vjetnamio... Bonvolu anonciĝi ĉe la kasisto de la Libroservo. La libroj disponeblas en la Limigita Kvanto per la Fondaĵo de donacinto.

Atenton! Ret-adreso de komisiono pri virina agado

La ret-adreso de komisiono pri virina agado devas esti komisiono-pri-virina-agado-subscribe@yahoogroups.com kaj ne ...subskribe-... Detalojn bv. demandu al hortensio@hanmir.com aŭ hortensio@paran.com.

Saluton al ĉiuj ‘skajpantoj’.

Antaŭ kiam li lasas Ĉinion, “mifont” salutas tre varme siajn perskajpajn lokajn amikojn; maro, krilo, celunio, liha, koleno, Song Bin Lihua, Jara, Cielismo, Zhang Changsheng, Xiong Linping, Terano, Gong Xiaofeng, Chen Yafen, Xiang Hong, Sesar, Begonio, Hu Guozhu, ĉiujn kiuj uzas la kromnomon uk-2004, kaj ĉiujn aliajn... Li deziras novajn kaj agrablajn rendevuojn al ĉiuj. **Mifont**, KN 1511

Perditaj !!!

Okulvitroj

Mi (KN 1791) perdis okulvitrojn kun nigra rigida ujo. Retorvinto bv. ilin doni al Ĝiceto “perditaj objektoj” aŭ Hotelo Continental (Wuzhou Dajudian) ĉe la kongresejo por ĉambro 950. Mi forlasos Ĉinujojn 2004-08-03. Mia telefono +39 333 255 1904 funkcias ankaŭ en Ĉinujo. Grandegan antaŭdankon!

Fotilo

Se iu trovis diĝitalan fotilon “Panasonic lumix DMC-FZ1”, kontaktu per rendevua tabulo. KN 494

La projekto “Ĝemelaj Urboj” diras al vi...

La projekton “Ĝemelaj Urboj” UEA jam prenis kiel unu el la laboroj de UEA 2003/2005, sed de kelkaj tagoj mi trovis, ke nemalmultaj kongresanoj ne bone scias ĝin, eĉ tute ne. Do, nun mi kaptas la lastan tagon por prezenti al vi ĝian koncizan enhavon. Mi antaŭgajos kaj antaŭdankos pro tio se vi povas legi ĝin kaj diskonigi ĝin al viaj konatoj post tiu ĉi UK.

La projekto ekfunkciis en majo de 2002. Ĝi celas disvastigi Esperanton en ĝemelaj urboj kaj ĝemeliĝi urbojn per Esperanto. “Informilo de Ĝemelaj Urboj” estas ĝia reta revueto, kiu regule aperas ĉiutrimonate. Ĝis nun ĝi entute havis 9 numerojn. La projekto havas sian laborplanon, jen estas:

1. Klopodi kontakt(ig)i esperantistojn loĝantajn en jam ĝemelaj urboj, por ke ili kune proponu kunlaboron al la lokaj instancoj cele al intensigo de la ĝemelaj interŝanĝoj.
2. Verki konsilaron kiel kontakti la urbajn aŭtoritatojn, proponante servojn de la esperantistoj en starigo aŭ/kaj plibonigo de interurbaj ĝemelaj rilatoj.
3. Instigu esperantistojn iniciati ĝemelajn rilatojn en propra urbo.
4. Klopodi establi kontaktojn kun institucioj-naciaj kaj internaciaj, kiuj agas en tiu kampo, por interŝanĝo de informoj kaj proponante kunlaboron por tion realigi.
5. Alvoki esperantistojn kiuj loĝas en ĝemelaj urboj, komuniki al la komisiito la koncernajn urbonomojn, ĉu ili jam establis kontaktojn kun la esperantistoj de tiuj urboj.
6. Komuniki al la esperantistoj la adresojn de la esperantistoj loĝantaj en la ĝemelurboj por establi kontaktojn.

Wu Guojiang, KN 0473, amikeco999@21cn.com

Pro manko de spaco ni ne povis aperigi ĉiujn artikolojn senditajn. La redaktantoj de nia ĉiutaga ĵurnaleto (Kuriero) petas pardonon de kongresanoj! Se via laboro ne aperas sur nia ĵurnaleto, kulpas ni kaj ne vi! Senlace laboru plu por nia bela sonĝo! Redaktantoj

Perdinto de fotilo venu al Halo 15, nivelo 3, por kolekti ĝin.

Kroma paĝo

Kuriero de 89a Universala Kongreso de Esperanto

via ĉiutaga ĵurnaleto

sabato 31a de julio, 2004

Sukcesa Fermo de 89a UK



PEKINA DEKLARO

La 89a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino, Ĉinio, de la 24a ĝis la 31a de julio 2004 kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,

traktinte la temon "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj",

notante, ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj Unesko,

memorante, ke rezolucioj de Unesko notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko,

notante la "Raporton pri Homa Evoluigo 2004" de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,

alte taksante la agadon de la ĉina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkompreniĝo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucioj de Unesko,

DEKLARAS

ke demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia

interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,

ke estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn,

ke neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo,

ke sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj sian utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro-ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan kompreniĝon en egaleca etoso en nia hodiaŭa mondo,

ke por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondopaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la spirito de la Unesko-rezolucioj, ĉar tio faciligas lingvolernadon ĝenerale kaj antaŭenigas internaciecan aliron al la mondo.



Infanoj kantas kaj dancas por la 89-a UK Posttagmeze de la 29-a de julio kongresanetoj de la infanvartejo Song Qingling prezentis programerojn por la 89-a UK. UEA-prezidanto Renato Corsetti faris alparolon al la infanoj.

Mia-imprese la UK

DENOVE EN MIA UK—"BAPTEJO"

Ŝajne ne trapasis tiom da tempo post la feliĉa, sukcesa mia vojaĝo por la 71-a UK en la jaro 1986, ĉar nun mia koro denove batas samforte kaj estas plenplena de sama ĝojo, kiel antaŭ 18 jaroj.

Tiam la 1-an fojon mi vojaĝis por ĉeesti la UK; la gastigantan landon – Ĉinion – mi kunligis kun la fabeloj de mia infaneco, kun la lecionoj de geografio en la lernejo, kun libroj kaj filmoj pri la ĉina luktarto. Nun mi vojaĝis ne simple por denove partopreni UK tie ĉi, sed ankaŭ por renkontiĝi kun malnovaj geamikoj kaj trovi novajn.

Neniam mi povus forgesi, ke mia universalkongresa "bapto" okazis tiam, antaŭ 18j., kaj tie ĉi – en Pekino. Ĝi estis en plenmika rondo kaj mirinda etoso. Tiam mi ricevis ankaŭ la plej karesan, plej ĉarman almonon de la ĉeestantoj – "la ridema knabino". Feliĉe, la rideton mi ne perdis dum la jaroj kaj ĝi, kiel mia "identigilo" ĉiutage plimultigas la rondon de mia amikaro. La varma amika etoso plenigas niajn kongresajn kontaktojn kaj kolorigas niajn kongresajn tagojn. Komparante la nunan 89-an kun la antaŭa 71-a UK mi konstatas, ke la amikeco kaj la bonkoreco ankoraŭ plialtiĝis kaj plifortiĝis. Ni gardu ĉiam nian UK-an amikan rondon!

Antoaneta Nikolaeva, KN 0552/89-a UK, Pekino, 2004
ANI, la "ridema knabino", KN 2190/71-a UK, Pekino, 1986



VERDAJ FAJREROJ

Niaj longjara leganto kaj korespondanto de EPĈ Dinko Matković el Kroatio (KN 1147) vizitis nian redaktejon kaj donacis al ni sian libron de aforismoj 333 *CERBAJ IMPULSOJ*. Jen kvar pensoj kun niaj akompanaj vortoj:

Samideanoj estas feliĉaj homoj, ĉar sufiĉas, ke unu pensu por ĉiuj. Ĉu tio estas kaŭzo, ke ne ĉiu esperantisto estas aktiva?

En la zamenhofa poemo "La vojo" troviĝas la verso: "Eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan." Verŝajne tio estis impulso por nefigura aforismo: **Eĉ guto malgranda konstante frapante kaŭzas kapdoloron.**

Ĉe la poŝtoŝeĉejo en la kongresa salono ĉiam estas vigle dum kongresaj tagoj: kongresanoj sendas poŝtaĵojn al ĉiuj partoj de la mondo. **Poŝtaĵo laŭ nia volo kaj poŝtaĵo laŭ nia devo.**

Kaj la lasta aforismo: **Rilate al sukceso de Esperanto ni ne estu nur esperantoj.**

Decido de Bahaa Kredo pri Helpa Lingvo

Dum la Nitobe-Simpozio la oficiala pozicio de la ĉefa instanco de la Bahaa Kredo koncerne universalan helpan lingvon estas klarigita jene:

- (1) Neniu bahaano scias kiun lingvon la mondo fine adoptos.
- (2) Bahaanoj subtenas ĉiujn porpacajn movadojn inkluzive de ĉiuj raciaj kandidatoj celantaj principon de universala helpa lingvo: "Ni ne estas protagonistoj de iu ajn specifa lingvo". "Estas, tamen, nenio en la bahaaj instruoj kio sugestas, ke la angla fariĝos la Internacia Helpa Lingvo".
- (3) La pozicio de la Bahaa Kredo "ankoraŭ ne intencas agi pri la elekto de Universala Helpa Lingvo, ĉar la cirkonstancoj ĝis nun malkonvenas", ĉar "tio kaŭzus (por bahaanoj) pli da malfaciloj ol per tio estus solvataj nuntempe".

La pozicio de Bahaa Esperanto-Ligo kompreneble kongruas kun la ĉi-supraj vortoj, sed tamen, kaj gravege tamen, kial tiom malmultaj bahaanoj scias la jenajn komentojn de "Abdu'l-Bahá: 'La plej grava servo al la homaro estas establi tiun ĉi internacian helpkomunikilon' kaj ke li eĉ instigis al bahaanoj kiel individuaj kredantoj (neniam al la ĉefa bahaana instanco kiel institucio) jene: 'Ĉiu el ni devas studi Esperanton'."

Do, bv. veni por diskuti la ŝajnajn sed ne realajn kontraŭdirojn kaj por ricevi en Esperanto aŭ en la angla liajn precizajn vortojn por ke vi eventuale interkonsiliĝu kun bahaanoj en via propra lando en via patrina lingvo pri tiu ĉi plej elstara el ĉiuj bahaaj principoj survoje al la realigado de la monda paco. "La realiĝo de universala lingvo estos la plej bela atingo de la epoko". "La plej granda el ĉiuj porunuecaj rimedoj por la popoloj de la mondo estas interkompreniĝo en skribo kaj parolo." Bahá'ulláh.

Kolor-riĉa Kongreso.

Dank' al talenta laboro de niaj fotistoj, nia bela memoro pri nia kongreso restos porĉiam sur papero.



*Kongresanojn salutas la
redaktantoj de nia ĉiutaga
ĵurnaleto Wen Jingen, KN 548,
Gu Zhongjin, KN 1041, Jiang Xinyu,
KN 0443, Li Na, KN 0454, Lu Jie,
KN 0455.*



Fotoj: Liu Sigong, KN1045, Zhao Xi, KN 1058, Li Yuwei, KN 1046